

DEL POPOLO
CINIO

中國報道

5 1986





Frua printempo

Foto de GAÜ MINGJI

Enhavo

Sur la tero de volontuloj-ekspluatantoj	2
TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (16): Prosperas la tibeta merkato	53
Ŝjamen iranta al la mondo	6
Strebado de du generacioj	14
POR LA 71-A UK: Utilaj informoj pri Ĉinio	19
Konkurso por teatraĵo de EVA	22
POR KOMENCANTOJ: Sennoma floro	23
ESP-NOVAĴOJ	24
Tradicia ĉina arta trezoro — gravurita lakaĵo de Pekino	36
Televida programo en Pekino	27
La ĉina vejĉio kaj la internacia interŝanĝo de vejĉi-ludarto	42
Argilaj militistoj de Ĉu-regno	10
SCIENCAJ ESEOJ:	
Titano -- atleto el la metaloj	45
Nova nutraĵo — selen-riĉaj manĝaĵoj	45
La plej kara. . . (Mikronovelo)	26
“Ĉasisto” el vasta arbaro	47
EL REALA VIVO DE ĈINIO: Sur Tjan'anmen-placo	60
VOJAĜO TRA ĈINIO: Bela monturbo Ĉongĉing	30
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Dek famaj vidindejoj de Ĉinio	39
KURANTAĴ AFEROJ	50
AMUZO	64
ĈINLINGVA KURSO	67
SUR LA KOVRILO: Knabino	Foto de ŜEN ĈEN
INTERNE DE LA KOVRILO: Frua printempo	Foto de GAŬ MINGJI
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Ĉerko el oro kaj arĝento (Artaĵo)	Foto de GŬO JOŬMIN
SUR LA DORSKOVRILO: Antikvaj temploj en montaro (Ĉinstila pentraĵo)	de ŬANG ŜAŬMING

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Iugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50					

Sur la tero de volontuloj-ekspluatantoj

— Vizito al Gongĉing-urbeto

de ĜENG ĜENGJE

Fakte la urbeto nomiĝas Gongĉing-kultivejo, kun areo de nur 21.1 kvadrataj kilometroj. Tamen oni fiere nomas ĝin Gongĉing-urbeto.

Oni ne povas trovi la nomon de tiu urbeto en ĉina mapo. Estas ne senkaŭze, ke kiam preterpasis ĝin grupo da usonaj turistoj, kiuj vojaĝis de Nanĉang, Ĝjangŝji-provinco, al Luŝan-monto, ili mire diris, ke ĝi ŝajne falis de la ĉielo.

30 JAROJ DE LA KULTIVEJO

De la ĉielo ne falas frandaj kukoj. La kultivejo ĉe la suda piedo de Luŝan-monto kaj apud

la lago Pojang jam trapasis 30 neordinarajn jarojn.

En la malfrua aŭtuno de 1955, 98 junaj volontuloj forlasis la plej movoplenan urbon Ŝanhajo de Ĉinio kaj venis al la Montaro Ĝjuŝjan en Dean-gubernio, Ĝjangŝji-provinco, kie vagis sovaĝaj bestoj kaj kreskis vepro.

Tiam troviĝis pli ol cent milionoj da hektaroj da virga tero en la tuta lando. Oni planis ekspluati 3.3 milionojn da hektaroj en la Unua Kvinjara Plano (1953-1957). Kelkdek trupoj da volontuloj-ekspluatantoj el 16 provincoj kaj mu-

Malnovaj taĉmentanoj kaj ilia antaŭa taĉmenta flago kun vortoj "Venki malfacilojn kaj turni la virgan teron en la fekundan!"



nicipoj partoprenis en tiu granda afero. Unu el ili estis ilia taĉmento.

Vekiĝis la virga tero.

Tiuj junuloj antaŭe esperis funkciigi kombajnon, sed atinginte tien ili trovis, ke eĉ mantraktoro ne povas eniri la lokon. Ili devis uzi ŝpaton pezan je 3-4 kilogramoj por terekspluatado kaj loĝi en memstarigitaj simplaj kabanoj. En vintraj noktoj hurlanta norda vento ruliĝis senĉese en la kabanojn, vekiĝinte matene, ili trovis prujnan tavolon sur la litkovrilo. Kun persistemo de junuloj ili ekspluatis 20 hektarojn da virga tero tiujare.

Pasis jaroj. Tiu ĉi taĉmento translokiĝis al Ĝinhu de Dean-gubernio kaj en 1969 al Nanhu, la sidejo de la nuna Gongĉing-urbeto.

En Nanhu troviĝis 800 hektaroj da virga tero, kun riĉaj naturdotaĵoj kaj bona perspektivo. Tamen, limigite de la tradicia produkta maniero, la taĉmentanoj tiam devis labori permane por simpla vivtenado, tiel ke nenia miraklo okazis tie.

En porviva luktado oni iom post iom ekkonis, ke krom produkti grenon, oni devas ankaŭ plene utiligi lokajn laborfortojn kaj naturajn riĉfontojn kaj entrepreni prilaboradon de agrokulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj aliajn industriojn, por turni la naturan kaj laborfortan supercojn de Gongĉing-kultivejo en ekonomian supercon. Poste, oni kolektis 4 000 jŭanojn (3.20 jŭanoj egalas al 1 usona dolaro) kaj konstruis fabriksdomon por pekli anasojn. Tiujare ili produktis 110 000 bongustajn peklitajn anasojn kaj el tio rikoltis 90 000 jŭanojn da profito. Tiam Gongĉing-kultivejo havis pli ol 2 000 laborantojn. Post la grandega inundo ili ekspluatis 120 hektarojn da virga tero. Dank' al tio, ili kontentigis sian bezonon pri greno kaj liveris al la ŝtato 210 000 kilogramojn da greno.

En la fino de 1985, kiam mi vizitis Gongĉing-urbeton, mi trovis, ke tie jam vivas 10 000 loĝantoj el 19 provincoj kaj municipoj, kaj funkcias 24 entreprenoj, kiaj fabrikoj de anasopeklado, plumaj produktaĵoj, maŝinriparado, elektro, konstruaj materialoj, porpakaj materialoj, nefortaj alkohol-entenaĵoj, vestoj kaj muzikiloj, bredejo de malgrasaviandaj porkoj kaj aliaj. Oni diris, ke ekde 1969 la ŝtato investis al tiu kultivejo 206 000 jŭanojn, sed ĝi donis al la ŝtato profiton kaj imposton de pli ol 20 milionoj da jŭanoj. En 1985 la totala produktovaloru de indus-

trio kaj agrokulturo de la urbeto superis 100 milionojn da jŭanoj.

VIDAĴOJ EN GONGĈING-URBETO

En neĝa tago mi vizitis Gongĉing-urbeton.

Kiam mi vagis sur larĝa betona strato, mi estis forte altirata de strataj lampoj en vicoj, belaj promenejoj meze aŭ apude de strato, bone lokitaj fabrikoj, vendejoj, banko, gastejo, restoracioj, kinujo, hospitalo, lernejoj, infanvartejoj, infanĝardenoj kaj loĝdomoj. Tie nek regis urba bruoj, nek senĉese moviĝis aŭtoj kaj homamasoj.

Aŭdinte, ke la plumaj vestoj kun la fabrikmanko "Cigno", faritaj de Gongĉing-urbeto, havas grandan debiton ne nur enlande, sed ankaŭ en pli ol 30 landoj kaj regionoj, mi unue vizitis la fabrikon.

Enirinte la vestiblon de ĝia domo, mi vidis hele kafe kolorajn kolonojn, radiajn vitrajn pend-lampojn kaj grandan porcelanan bildon "Granda Muro" sur belkolora kahela muro. Mi sentis min kvazaŭ en bela hotelo. Preterpasinte la artefari-tajn monteton kaj kioskon meze de la vestiblo, mi ascendis la sepan etaĝon. Tie mi vidis, ke la laboristoj ĉe elektraj kudromaŝinoj faras diversajn plumajn vestojn titolitajn per "naturaj malpezaj vintro-vestoj". 80% el la laboristoj estas junuloj malpli-ol-30-jaraj. La leviĝo de la viv-nivelo de popolanoj aperigis enlande "manion de plumaj vestoj". Pro tio la laboristoj devis streĉe labori eĉ en postlaboraj horoj kaj multaj el ili eĉ devis rezigni rendezuojn en libertagoj aŭ festotagoj. Plendis pri tio iuj laboristoj. "Kvankam ni plendas, tamen efektive ni partoprenas en plus-laboro!" Tiel diris iu junulo senhezite. Tiu fabriko ĉiutage produktas 7 000 plumajn vestojn, inkluzive jakon, surtuton, infanveston, vestojn por motorciklistoj, turistoj, ĉasistoj, prospektoris-toj, surmaraj kaj petrolaj laborantoj, sportistoj kaj fotistoj. Krome, la fabriko produktas ankaŭ litkovrilojn, kapkusenojn, dormosakojn ktp.

Forlasinte la fabrikon, mi venis al la fabriko de nefortaj alkohol-entenaĵoj kun areo de 14 000 kvadrataj metroj. Ĝi havas tri laborejojn kaj unu oficejon, kiuj kroĉiĝas laŭ montodeklivo kaj aspektas bele.

"Ĉu estas garantiata la vendado de vinoj? De kie vi havigas la materialojn?" kun iom da maltrankvilo mi demandis Jŭan Ŝingĝi, vicestron de la fabriko. Li respondis: "La vendado ne estas problema. Nia provinco enportas ĉiujare de la




En fabriko de plumaj vestoj

nordo 6 000 tunojn da vino. Post la fondiĝo de tiu ĉi fabriko kun jara produktokvanto de 23 500 tunoj da vino, oni povos redukti la kvanton de enportota vino. Ankaŭ ĝiaj materialoj estas facile haveblaj, ĉar nia loko havas bonan situon, en la vasta kamparo oni povas akiri grandan kvanton da aktinidiaj (*Actinidia chinensis*), mirikaj (*Myrica rubra*) fruktoj k. a. kaj plie, jam multaj jaroj pasis post kiam sukcesis nia eksperimento pri kultivado de nordaj vinberujoj en la sudo. Rigardu, nia vinberuja bazo troviĝas sur la kontraŭa montodeklivo!" En la montrita direkto mi vidis pecojn post pecoj da vitoĝardenoj.

Trapasinte la komercan distrikton, mi alvenis en kampojn. La rizo estis jam rikoltita, tamen ankoraŭ verdis tritikidoj kaj legomoj en kampoj de pli ol 300 hektaroj, inter la verdaĵoj, akvokampoj kaj lagetoj brilis kiel speguloj. Kultiveja la-

Nova urbeto sur la antaŭa dezerto



boristo Liŭ Jujin diris al mi, ke lia edzino laboras kiel ekzamenistino en la fabriko de plumaj vestoj kaj iliaj infanoj vizitas la lernejon funkciigatan de la kultivejo; en 1985 li laŭkontrakte kulturis 8 hektarojn da rizkampoj de la kolektivo, kaj dank' al sia diligenta laborado, li rikoltis 77 000 kilogramojn da rizo en la aŭtuno. Vendinte la rizon al la kultivejo, li ricevis 4 000 jŭanojn.

NE ESTAS TEMPO POR RIPOZI EN OMBRO

"Mi tre admiras, ke la veteranaj kultivistoj dumane kreis por ni tiel bonan laboran kaj vivan medion. Jam pasis la tempo plugi kampon per ŝpato. Ni ne devas nur labori tuttage, sed vivi pli bunte," diris al mi Ju Jaŭling, filino de veterana kultivisto.

Ŝi estas 23-jara kaj laboras en la projekta sekcio de la fabriko. En la hejmo ofte okazis malgrandaj konfliktoj inter ŝi kaj la patrino. La patrino malĝojis, ke la filino ŝatas danci, rigardi filmojn, sin beligi kaj frandi. Ĉiufoje, kiam ŝia patrino plandis, Ju Jaŭling respondis nur: "Paŭjo, nun estas la okdekaj jaroj!"

La laboristinoj tamen laŭdis, ke eta Ju laboras serioze. Komence ŝia majstro ofte publike forŝiris ŝiajn desegnojn pro maltaŭgeco. Sed ŝi ne deprimiĝis, sed sin ekzercis pri desegnado ofte ĝis profunda nokto kaj cerbumis pri bildoj faritaj de la majstro. Ŝi finfine posedis la fundamentajn teknikojn de desegnado. Kiam ŝi oficvojaĝis aliloken, ŝi ofte vizitis vestovendejojn kaj desegnigis la fasonojn de laŭmodaj vestoj. Trovinte mode-

*En muntado de or-
geno*




vestitajn pasantojn surstrate, ŝi do sekvis ilin por desegni la vestojn. Ŝi turnis grandan atenton sur modojn, poziciojn kaj kolorojn de kolumoj, manikoj, poŝoj kaj aliaj de plumaj vestoj kaj lerte projektis pli ol dek modajn specojn de plumaj vestoj.

Ĉe la enirejo de la "Junula Domo" kun kiosko, artefarita monteto kaj ponteto super rivereto staras unu statuo de fortika junulo leviĝanta el fragmitoj, etendanta unu manon antaŭen kaj tenanta per la alia la modelon de atomo, kies elektronoj moviĝas ĉirkaŭ la nukleo. Ĝi simbolas la

sciencan spiriton de la junuloj de Gongĉing-kultivejo en kreado de la estonteco.

Sing Ĉinglaj, vicestro de la kultivejo, estas junulo, diplomita el elementa mezlernejo. Dank' al sia persista memlernado en postlaboraj horoj, li gajnis la titolon de ekonomikisto, trapasinte la ŝtatan ekzamenon. Sur la skribotablo de Ju Ŝujju, estro de la porkomaturiĝa laborejo de la bredejo de malgrasaviandaj porkoj, mi vidis amason da libroj pri bestobredado kaj bestokuracado. Mi demandis: "Kial vi aĉetis tiom da libroj?" Li modeste respondis: "Mi pli kaj pli sentas, ke miaj scioj estas ne sufiĉaj por mia laboro, tial mi volas atingi en memlernado la nivelon de universitata diplomito." Kiel aliaj junuloj, liaj salajroj kaj premia monsumo estis ne multaj, tamen li havas firman volon esti pioniro de la nova generacio. Prenante vinfeĉon kaj eluzitan likvaĵon kiel materialon, li provfaris furaĝan fermenton kun 56% de proteino. En 1985, tiu invento gajnis premion de scienca kaj teknika frukto de la provinco. La bredejo povos ĉiujare eksporti 3 000—4 000 porkojn al Hongkong kaj la procento de malgrasa viando superis 58%.

Similaj aferoj estas multaj en la nova generacio de Gongĉing-urbeto. En Ĉinio cirkulas aforismo "La antaŭuloj plantas arbojn, ke la posteuloj ripozu en la ombro." Sed multaj junuloj diris al mi, ke nia lando estas kompare malriĉa, nun ankoraŭ ne estas tempo, ke ni "ripozu en ombro".



Ŝjamen iranta al la mondo

de GE ŜI

De post marto 1984, kiam la areo de la Ŝjamen-a Speciala Ekonomia Distrikto ekspansiis al la tuta insulo, Ŝjamen estas ĉiam pli atentata de la mondo pro sia aparta ĉarmo. Alvenas pli kaj pli multaj eksterlandaj turistoj kaj komercistoj por fari negocon. Laŭ statistiko, de 1984 ĝis novembro 1985, pli ol 2 000 alilandaj komercistoj alvenis kaj kontraktis 296 interkonsentojn kun investaĵoj de pli ol 650 milionoj da usonaj dolaroj. Multiĝas grandaj konsorcioj, investantoj, kontraktantoj kaj konstruobjektoj kun avangardaj teknikoj.

Pro kio Ŝjamen estas tiel alloga?


La avantaĝaj kondiĉoj de Ŝjamen, kiel unu el la specialaj ekonomiaj distriktoj de Ĉinio, estas ĝiaj haveno, aerodromo kaj komuniko multe priparolataj de

eksterlandaj investantoj. Ĝi kun historio de pli ol 400 jaroj estas grava eksterkomerca haveno ĉe la sudorienta marbordo de Ĉinio. La haveno vasta, profunda, neobstruktata kaj neglaciiga estas unu el la bonaj naturaj havenoj de Ĉinio. La malpli-ol-50 000-tonelaj ŝipoj povas libere en- kaj eldokiĝi, ne influate de tajdo. Nun ĝi havas komercan kontaktiĝon kun pli ol 80 landoj kaj regionoj de la mondo. Kun konstruado de la speciala ekonomia distrikto, en la profundakva doko Dongdu oni jam finkonstruis kvar ankrejojn de la unuaj-perioda konstruo kaj donis ilin al uzado. Inter ili estas unu ankrejo por 50 000-tonela ŝipo kaj unu por 10 000-tonela kontenerŝipo. La en- kaj elŝipiga kapablo de la haveno duobliĝis. La internacia flughaveno finkonstruita kaj malfermita al trafiko en oktobro 1983 havas aer-

liniojn al Pekino, Ŝanhajo, Kanton, Fuĝoŭ, Hongkong, Manilo de Filipinoj kaj Japanio. La 10 000-telefona program-rega interŝanĝa sistemo ekfunkciigita en 1985 malfermis liniojn de rektaj buton-premaj telefonoj kondukantaj al diversaj urbegoj de Ĉinio, kaj al Japanio, Usono kaj Hongkong. Ankaŭ mikroonda komuniko estas en funkciado. La rapidaj trafiko kaj komuniko faris Ŝjamen kunliganta sin kun la mondo.

Sen bona investa medio la speciala ekonomia distrikto do perdas allogon al alilandaj investantoj, tion bone konas la konstruantoj de la distrikto. Ekde la fondiĝo de la distrikto en 1981, ili kondukas fundamentan konstruadon laŭ siaj konkretaj kondiĉoj, kio metis solidan bazon por la posta ekonomia flugo. En la komenco ĝia Hulia Industria Distrikto havis nur areon de 2.5 kvadrataj kilometroj sur dezerta marbordo. Post plurjara peniga konstruado tie aperis nova industria distrikto kun asfaltitaj vojoj, efikaj akvo-proviza kaj -drena sistemoj, ĝenerale uzablaj fabriksdomoj kun totala areo de 350 000 kvadrataj metroj kaj ŝtalstrukturaj fabriksdomoj kun areo de 20 000 kvadrataj metroj por vendo kaj ludonado, PTT-domo, magazenoj, restoracioj, dekoj da bonordaj kaj helaj loĝdomoj kaj graciaj vilaoj, ĉio ĉi tio vekis grandan intereson ĉe la investantoj. Post kiam la speciala ekonomia distrikto ekspansiis al la tuta

Luksa plezurŝipo konstruita de la Ŝjamen-a Plezurŝipa Fabriko kaj iu plezurŝipa limigita kompanio de Usono





La Ŝjamen-a Speciala Ekonomia Distrikto en Konstruado

Foto de LI KAJCONG

insulo (inkluzive la insuleton Gulangju), la totala areo atingis 131 kvadratajn kilometrojn, oni faris laŭplanan ekspluatadon kaj fundamentan konstruadon. La nova Jundang-a Kvartalo kun 15 kvadrataj kilometroj estos konstruita en financan kaj negocan centron. Tie aperos internacia financa domo, internacia negoca domo, komerca domo, oficaĵoj, luksaj apartamentoj kaj restoracioj. La Ĝjangtoŭ-Ljanban-a Industria Distrikto nove fondita en la meza parto de la insulo kun pli granda skalo havas areon de 30 kvadrataj kilometroj por ekspluata konstruado, tie oni konstruos industrian

distrikton de teknikoj- kaj scioj-koncentra tipo kun elektronika industrio kiel la centro.

Kun pliboniĝo de la investa medio, alvenis investantoj unu post alia. Interalie, internacie famaj grandaj kompanioj kaj konsorcioj, kiaj usonaj Kodak, Wangan-Laboratorioj, Koka-kola, Rejnolds-Industrioj, japana Sony, kanada Siemens-Korporacio kaj aliaj, kontraktis kun Ŝjamen interkonsentojn pri komuna investado aŭ kunlaborado. Iliaj investaĵoj mem estas plej bona propagando por Ŝjamen. En 1982 funkciis nur unu entrepreno kun alilanda investaĵo, sed ĝis novembro 1985 jam ek-

funkciis 22 tiaj entreprenoj, kies produktovaloro atingis pli ol 330 milionojn da jŭanoj (3.2 jŭanoj egalas al unu usona dolaro) en la unuaj 11 monatoj de 1985 kaj konsistigis 17.7% de la totala industria produktovaloro de la urbo.

La reformado de la malnovaj entreprenoj estas grava kondiĉo por disvolviĝo de la distrikto. Ŝjamen nun havas 767 industriajn entreprenojn, el kiuj 588 troviĝas en la insulo. Ili plejparte fondiĝis inter la fino de la 50-aj jaroj kaj komenco de la 60-aj jaroj. Iliaj ekipaĵoj malnoviĝis kaj la teknikoj eksmodiĝis, se oni ne faros al ili rapidan refor-

mon, ili certe malhelpos la ekonomian disvolviĝon de la distrikto. Tial Ŝjamen emfazis en sia konstruado enkondukon de novaj teknikoj por reformi malnovajn entreprenojn, kio jam akiris unuapaŝan efikon. Nun malnovaj entreprenoj kontraktis 126 interkonsentojn pri teknika reformo, el kiuj la funkciigataj entreprenoj post reformo akiris produktovaloron de proksimume cent milionoj da jŭanoj en la unuaj 9 monatoj de 1985, tio konsistigis pli ol 50% de la nove pliigita produktovaloro de la malnovaj entreprenoj. Lastatempe la Ŝjamen-a magistrato decidis, ke nombro da fabrikoj povos rekte kontrakti kaj

subskribi interkonsenton kun alilandaj komercistoj. Ĝis 1987 duono de la malnovaj entreprenoj estos tute aŭ parte reformita per la enkondukitaj avangardaj teknikoj kaj ekipaĵoj.


Ŝjamen estas konata kiel "surmara ĝardeno". Tie ondas montoj, ĉirkaŭas blua maro, vintre nefrosta, somere nevarmega, ĉiam verdas la arboj kaj herboj kaj prosperas floroj en ĉiu sezono. La surmara perlo Gulangju, miljara templo Suda Putŭo, la vidindejo Ŭanŝijan kaj aliaj turismaj lokoj, la ĉarmaj marbordaj banejoj, kvietaj somerumejoj kune formis belegan sudan pejzaĝon. Post fondo de la speciala

ekonomia distrikto la turismaj lokoj de Ŝjamen disradias ĉiam pli brile. Estis jam kontraktitaj 11 grandaj konstruobjektoj por internacia turismo, inkluzive de la hoteloj Huliŝan, Ĝinĉjaŭ, Hajŝang kaj Maroĝua Turisma Vilaĝo, kun totala investaĵo de pli ol 130 milionoj da usonaj dolaroj. Nun Ŝjamen faras projektadon kaj konstruadon al la ĉefa turisma loko Gulangju. Sanatorioj de iuj fabrikoj, entreprenoj kaj ŝtataj institucioj estas translokataj el la insulo. La Maroĝua Turisma Vilaĝo kaj turisma doko estas en konstruado, kio montras, ke en Ŝjamen la turisma afero pli rapide disvolviĝos.

La marborda banejo de Gulangju

Foto de LI KAJCONG





La kontenerizita doko Dongdu

Foto de LI KAJCONG

La nova internacia flughaveno

Foto de ĜAJ PEJFU



Argilaj militistoj de Ĉu-regno

de ŜIN ĈJI

Fotoj de JUN FENG



Argila homfiguro kun harligo kvazaŭ tenas ion en la dekstra mano.

Surgenuaj argilaj homfiguroj






La kapo de argila ĉevalo

Versimilaj argilaj homfiguroj kun harligo



Argilaj militistoj en kiraso





Kavo de argilaj militistoj kaj ĉevaloj

Argila militisto kun sagujo sur la dorso

Ŝjuĝoŭ situanta en la nordokcidenta Ĝjang-su-provinco estis ĉefurbo de Ĉu-regno en la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K.—8 p. K.). De antikve ĝi estas strategie grava loko, kiun volis okupi ĉiuj militistoj en la bataloj. Iun tagon de decembro 1984, en la konstruado iu fabriko malkovris pli ol 4 000 argilajn soldatojn kaj ĉevalojn, kiuj servis kiel kunaj entombigitaĵoj de reĝo de Ĉu-regno, kiu mortis antaŭ pli ol 2 000 jaroj. Tio estas alia grava malkovro post elterigo de argilaj soldatoj kaj ĉevaloj de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio en Lintong, Ŝjian-urbo, Ŝenŝji-provinco, kaj tiuj koloraj de la Okcidenta Han-dinastio en Jangĝjaŭan de urbo Ŝjanjang de la sama provinco.

Nun oni jam elfosis la kavojn n-rojn 1 kaj 2 kun argilaj infanterianoj. Estis malkovritaj tri tiaj kavoj, ĉiu 28 metrojn longa, 2.5 metrojn larĝa kaj ĉ. 0.6 metron profunda. Samtempe oni malkovris ankaŭ kavon de argilaj kavalerianoj kun longo de ĉ. 12 metroj kaj larĝo de ĉ. 3 metroj ĉ. 120 metrojn nordokcidente de la kavoj.

En la kavoj de argilaj infanterianoj la argilaj figuroj viciĝas en bona ordo. 10 staraj aŭ 8 sidaj infanterianoj formas unu vicon kaj ankaŭ estas tia vico, kiu konsistas el 5-6 argilaj figuroj. La figuroj el argilo griza aŭ malmultaj el argilo grizbruna estas mulditaj. La bakitaj argilaĵoj estas glazuritaj tutkorpe blanke kaj ruĝe en apartaj korpopartoj, iuj kun kapo nigra. La acideco de la tero senkolorigis preskaŭ ĉiujn argilaĵojn escepte de apartaj partoj de la argilaĵoj bone konservataj. La argilaĵoj havas dekelkajn diversajn formojn, kun altoj de 25 ĝis 54 centimetroj. Tie videblas argilaj figuroj staraj, surgenuaj, infanterianaj, generalaj kaj tiuj kun kirasoj.

Antaŭ la orienta parto de la kavo n-ro 1 staras komanda ĉaro tirata de kvar argilaj ĉevaloj kviete staraj ĉiu kun alte tenata kapo, streĉitaj oreloj, larĝe malfermitaj okuloj kaj fortaj membroj. La ĉevaloj kun ronda kokso, forta muskolo kaj iom kurbe mallevita vosto aspektas vigle kaj sprite. Sur la ĉaro staras unu argila generalo en kasko kaj robo kaj kun kunmetitaj manplatoj antaŭ la brusto. La rektangula trueto en la mano montras ke li tenis ordonan ŝildon. Sub la maldekstra akselo videblas unu trueto, kiu estas eble postsigno de ligna spado putriĝinta. Ĝi havas larĝan frunton kun okuloj rigardantaj antaŭen kaj iom fermita buŝo, kio sentigas manieron de multesperta komandoro.

La argilaj militistoj kun sagujo sur la dorso portas tutkorpe kirason kaj staras surgenuaj. Iuj el la staraj argilaj soldatoj kiel ceremoniaj gvardianoj tenas en la manoj flagojn aŭ glavojn, aliaj kun kurbaj brakoj portas sagujon, kvazaŭ pafistoj. Ili kun kasko, harplektaĵo aŭ harligo sur la kapo, mienas serioze, trankvile, ĝoje aŭ medite. Iuj havas okulojn kaj buŝon fermitaj aŭ malfermitaj kaj nazlobojn streĉitaj aŭ malstreĉitaj, pintaj aŭ plataj. El la argilaj soldatoj mankas lipharuloj kaj ĉiuj aspektas kiel junuloj kaj mezaĝuloj. Tio montras ke la regno havis prosperan ekonomion, sufiĉan kvanton da junuloj por soldatiĝo.

Post esplorado oni konstatis, ke la argilaĵoj estis konsistiga parto de la tombo de reĝo en Ĉu-regno kaj servis kiel gvardianoj de la mortinto en la tombo. Laŭ takso, la tombejo troviĝas en la Leono-monteto ĉ. 200 metrojn oriente de la kavoj aŭ alia proksima monteto. Tion malkovros postaj arkeologoj.

La argilaĵoj konigas la formacion de la armeo de Ĉu-regno en la Okcidenta Han-dinastio. Ili prezentis gravajn materialojn por studi pri la vivo kaj moroj de Ĉu-regno kaj pri la ekipaĵoj, konsisto, manovrado, sistemo, formacio kaj specoj de ĝiaj infanterio kaj kavalerio. Kaj samtempe ili servas kiel valoraj materialoj por esplori skulpturon kaj vestojn de la Okcidenta Han-dinastio.

Nun tie jam ekfunkciis la Muzeo de la Argilaj Militistoj de Han-dinastio en la urbo Ŝjuĝoŭ.

Arkeologo en priĝosado



Strebado de du generacioj

de ŜAŬ BIN

Dank' al senlaca penado de sennombraj firmvolaj esperantistoj, la ĉina Esp-movado progresas paŝon post paŝo de la komenco de la nuna jarcento ĝis hodiaŭ, kvankam ĝi spertis plurajn malsukcesojn. Retrorigardante la du tajdojn de la ĉina Esp-movado antaŭ la 30-aj jaroj kaj post la 70-aj jaroj, ni povas dividi la ĉinajn esperantistojn en du generaciojn, kies strebado prezentas al ni la psikologian bazon de la disvolviĝo de Esperanto en Ĉinio.

LA UNUA GENERACIO: ŜANGĬ ESPERANTON DE IDEALO EN ILON

En 1840 la ĉina registaro de Ĉing-dinastio publike forbruligis amasegon da opio en Gŭang-dong, kio ofendis la britajn imperiistojn kaj tiel eksplodis la Opia Milito. Ĉinio perdis la militon, subskribis kun Britio la nacihumiligan Nankinan Traktaton kaj malfermis 5 havenurbojn al la eksterlando. Ekscitate de la Opia Milito kaj atakate de la okcidenta kulturo, ĉinaj intelektuloj

Junaj esperantistoj en kantado





Veteranaj kaj junaj esperantistoj de Ĝjangsu-provinco

sentis, ke por rezisti kontraŭ la fremda agreso kaj prosperigi Ĉinion, ili nepre devas lerni de la Okcidento. Post pli ol 70 jaroj la ĉinaj intelektuloj, prenante la Okcidenton kiel modelon, faris burĝaran revolucion kaj renversis Ĉing-registaron en 1911. Tiu granda ŝanĝo ege vigligis la ĉinajn ideologiajn rondojn. Tiam estis akceptitaj kaj diskutataj la burĝa demokratio, socialismo, marksismo, pacifismo kaj anarkiismo enkondukitaj de la Okcidento en Ĉinion. Ankaŭ la ideo de Zamenhof kaj la de li kreita Esperanto ekhavis nombron da adeptoj en Ĉinio.

Inter la unuaj ĉinaj esperantistoj estis nemalmultaj anarkiistoj, reprezentataj de membroj de la Ĉina Socialista Partio, siatempe famaj en la ĉina revolucio. Ilia gvidanto estis 28-jara Ĉen Jilong. Ĉen diris: “La Socialista Partio celas la tutan mondon kaj devas konduki la homaron en la veran liberecon, egalecon, fratecon.” Laŭ ili la ideo de Zamenhof kongruis kun ilia celo — likvidi ĉian malegalecon inter la homoj kaj realigi la grandan harmonion. Tial ilia propagando de Esperanto neniom diferencis de trumpetado de politika ideo. Fakte, Esperanto estis unu el la veroj de ili probatalataj. Tiuj bonkoraj gejunuloj

senlace propagandis anarkiismon kaj Esperanton kiel sian nacisavan doktrinion. Ili en sia revuo “Vivrimedoj” publike kontraŭis al la reakciaj fortoj, kiuj revis restaŭri feŭdismon, trumpetis revolucion kaj alte taksis Esperanton, kio havis grandan influon siatempe. En unu jaro tiu partio ja akceptis pli ol 500 000 membrojn kaj fondis 400 organojn, inter kiuj estis Esperanto-Societo kaj Civila Elementa Lernejo en Beiping (la nuna Pekino). La civila Elementa Lernejo la unua en Ĉinio akceptis samtempe lernantojn kaj lernantinojn kaj publike inokulis revoluciajn pensojn al la lernantoj kaj instruis al ili Esperanton, pro tio ĝi fariĝis klerigejo de postaj revoluciuloj. Deng Jingĉaŭ, prezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, edzino de la iama ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, estis interna lernanto de tiu lernejo, kie instruis ŝia patrino. Deng plurfoje ĉeestis la oratorojn de Ĉen Jilong kaj ofte aŭskultis sian patrinon diskuti kun siaj kolegoj pri socialismo kaj la granda harmonio. La edukadon en tiu ĉi lernejo eĉ hodiaŭ bone memoras Deng Jingĉaŭ. La revolucia tendenco de la partio kaj ĝia impeta disvolviĝo tuj vekis malamon ĉe la feŭdaj restaŭrantoj. La 6-an de aŭgusto,



Esperantistoj de Pekino

1913, Ĉen Jilong estis pafmortigita de la registaro de Ĵuan Ŝikaj, sekve de tio, la Ĉina Socialista Partio kaj la ĉina Esp-movado trafis malfeliĉon.

Sed la strebado de la ĉinaj intelektuloj povis esti strangolita de neniuj perforto. La malhelpo de la malnovaj fortoj povis kaŭzi nur pli grandan revolucionan tumulton. En 1915 aperis la revuo "Nova Junularo" kiun redaktis junaj intelektuloj. La revuo elspiris burĝaran demokration kaj plenenergie propagandis novajn ideologiojn, moralon kaj kulturon. Ĝia ĉefredaktoro Ĉen Duŝiŭ montris: "Por fondi novan okcident-stilan ŝtaton kaj organizi novan okcident-stilan socion konvenan en la hodiaŭa mondo, antaŭ ĉio oni devas enkonduki la novan kredon pri egaleco de homaj rajtoj, bazon de la okcident-stilaj ŝtatoj." Novembre de la sama jaro la revuo aperigis diskuton pri Esperanto en la rubriko "Korespondo", en kiu partoprenis famaj erudiciuloj. Spite al la malaprobo de iuj personoj, grandparto de ili subtenis Esperanton. Inter ili la rimarkigo de Lusin, fama verkisto, estis rigardata kiel reprezentanto. Li diris: "La homaro devos havi sian komunan lingvon en la estonteco", pro tio li "aprobas Esperanton". Krom tio, li emfazis ankaŭ, ke "lerni Esperanton estas unu afero kaj la spirito de Esperanto estas alia afero." "Inokuli justajn sciencojn kaj arton kaj plibonigi la ideon estas la unua afero, dum diskuti pri Esperanto okupas nur la duan lokon." De tio videblas, ke la tiamaj ĉinaj intelektuloj tiel alte taksis Esperanton ne nur pro ĝia internacia praktikebleco, sed pli grave estas, ke Esperanto enkorpiĝis ilian strebadon al la homa bonstato kaj nacia sendependeco.

Por sia bela idealo — paco kaj demokratio ili faris diligentan laboron kaj iuj dediĉis siajn tutan vivon kaj riĉaĵojn por fondi Esp-organizaĵojn, gvidi Esp-kursojn, elesperantigi literaturajn verkojn diversnaciajn por la ĉina junularo. Ilia laboro akcelis la progreson de la nova ĉina literaturo, tamen ĝi ne povis ŝanĝi la malluman staton de la tiamaj Ĉinio.

En 1914 eksplodis la Unua Mondmilito. La milito dubigis la ĉinajn intelektulojn pri la "nova okcident-stila socio". En 1917 triumfis la rusa oktobra revolucio, kio interesis la ĉinan popolon kaj vekis grandan atenton ĉe la intelektuloj. Tio larĝigis la vidkampon de la progresaj intelektuloj kaj ili trovis la novajn movfortojn decidantajn la sorton de Ĉinio. Ĉen Duŝiŭ, kiu opiniis Esperanton necesa por la hodiaŭa homaro, Maŭ Zedong, kiu surskribis por la Esperanto-ekspozicio en Jan'an en la 30-aj jaroj, kaj Ĝoŭ Enlaj, kiu donis apartan atenton al la ĉina Esp-laboro post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ĉiuj akceptis marksismon kaj fariĝis unuaj ĉinaj kompartianoj en tiu tempo. Ilia decido kaj la ĝisfunda kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma programo kaj aktivado de ilia partio donis nedubeblan grandan influon al la ĉina esperantistaro.

Post kiam la ĉina socio eniris en la 20-ajn jarojn, la popolo vivis pli mizere. Usona ĵurnalistoj Edgar Snow priskribis jene: "Iuj regionoj de tiu vasta, multe suferanta tero estas ofte atakataj de trosekeco kaj inundo. Ĉiufoje mi rimarkis, ke iras la ekonomia konfisko, senbride disvolviĝas la ekspluata tragedio, malleviĝas la po-

zicio de la kamparanoj kaj virinoj, kontinue kreskas la nombro de senkampaj kamparanoj kaj leviĝas tumultoj de la popolo.” El tio li konkludis, ke estos neevitebla la ĉina komunisma revolucio.

La ekzemplo de la rusa revolucio, disvastigo de marksismo, gvidado de la progresaj personoj kaj revoluciaj partioj, mallumo de la socia realo. . . Antaŭ ĉio ĉi la ĉinaj esperantistoj kaj Esperantaj simpatiantoj fine forlasis ĉiujn “ismojn” ne konvenajn al la realo kaj suriris la vojon de la nov-demokratia revolucio malfermitan de la Komunista Partio de Ĉinio. En 1930 fondiĝis la Unio de Ĉinaj Maldekstraj Verkistoj. En ĝi kolektiĝis preskaŭ ĉiuj progresemaj kulturaj personoj kaj organizoj, kiuj akceptis la gvidon de la Komunista Partio de Ĉinio, inkl. de la Ĉina Proleta Esperantista Unio organizita de Hujucz, Ĵelezo, Ĉ. Ĉen kaj aliaj esperantistoj. En 1933 en la dua kunveno de la Ŝanhaja Esperantista Asocio la Ĉina Proleta Esperantista Unio prezentis la sloganon “Per Esperanto por Liberigo de Ĉinio”, kiu estis aprobita de la tutlanda esperantistaro. Ekde tiam la ĉinaj esperantistoj klare vidis la veran signifon de Esperanto en la liberiga afero de la ĉina popolo kaj unuafoje difinis Esperanton kiel ilon de sia strebado en la vivo kaj ne celon. En la sekvaj jaroj la ĉinaj esperantistoj multe laboris en la kontraŭfaŝisma milito kaj liberiga afero de la ĉina popolo. Iuj eĉ oferis sian vivon. En 1951, Hujucz, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, diris en la fondkunveno de ĈEL: “Faktoj pruvis, ke Esperanto, tenate en la mano de la popolo, povas pliigi la forton de la mondaj popoloj kaj doni efikon por batali kontraŭ la malamikoj.”

LA DUA GENERACIO: PER ESPERANTO BELIGI LA HODIAŬON KAJ KREI LA ESTONTECON

En 1949, kiam naskiĝis la Ĉina Popola Respubliko, Ĉinio eniris en la periodon de paca konstruado. La ĉina registaro subtenis Esperanton kaj provizis kondiĉojn necesajn por ĝia disvolviĝo en Ĉinio. Tamen en la 70-aj jaroj, pro la politika ĥaoso la plejparto de la gejunuloj ne havis ŝancon ricevi bonan edukadon. La novaj laboristoj havis klarecon nur de elementa aŭ meza lernejo, tial Esperanto ne povis disvolviĝi tra la lando. En 1978 la ĉina registaro montris: “Ĉiuj niaj laboroj estas por la moderniga konstruado.” “Tiukaze, posedi sciojn de la modernaj scienco,

tekniko kaj kulturo estas urĝe bezone.” Nun la tutlanda popolo alte taksas la kulturan konstruadon. Ĝuste en tiu situacio ĈEL okazigis la Duan Esperantan Laborkunvenon de Ĉinio aŭguste de 1979. Decembre de la sama jaro la koncerna departemento de la registaro faris decidon, ke la gvidantoj de provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj subtenu sialokajn Esp-organizaĵojn en ties Esp-aktivado. De tiam Esperanto rapide disvastiĝas inter la scioavidaj ĉinaj gejunuloj. Post kelkaj jaroj Ĉinio jam havas ĉ. 200 000 esperantistojn.

Inter tiuj junaj esperantistoj la konsiderinda parto lernas nian lingvon por fari sin pli kompetentaj en laboro. En la 30-persona kunsido okazigita de mi por junaj esperantistoj en la Interna Mongolio, 13 junuloj diris, ke ili lernas Esperanton por sia laboro. Inter ili iuj estas poliglotoinstruistoj, por kiuj Esperanto estas plia ilo por legi fremdan literaturon, aliaj estas kuracistoj, kiuj volas konigi la ĉinan kaj mongolan medicinon al fremdaj landoj, opiniante, ke pere de Esperanto ili povas konigi siajn sciojn al pli da landoj, triaj estas servistoj, kiuj volas uzi Esperanton en necesaj kazoj. Kvankam Esperanto ankoraŭ ne povas kontentigi ilian bezonon portempe, tamen surbaze de sia sperto kaj praktiko ili firme kredas, ke Esperanto certe utilos al ili.

La aktivuloj de la Esp-movado, ĝenerale, troviĝas inter la supre diritaj ambiciaj gejunuloj. Ili sobre vidas, ke Esperanto ne povas populariĝi en mallonga tempo, kaj ke ili ne povas profiti de la lingvo. Malgraŭ tio, ili dediĉas al la Esp-movado sian tutan liberan tempon kaj klopodas gajni subtenon de la superuloj kaj kolegoj per sia bona laboro, unuigas kaj helpas siajn samideanojn en diversaj profesioj per siaj scioj pri Esperanto kaj kompare alta lingvonivelo, donas financan aŭ alispecan helpon al la Esp-movado. . . Ilia vidpunkto estas: Eble ni mem ne profitas de Esperanto, sed se ĉiu volas havigi al si maturan pomon, do kiu plantas la pomarbon?


En Ĉinio la diplomitoj de la superaj lernejoj kaj profesiaj ranguloj estas kompare bone traktataj, kaj plie, en 1982, la Eduka Ministerio de ĈPR reasertis, ke Esperanto povas funkcii kiel unu el la oficialaj ekzamenaj objektoj por diplomistudentojn, promocii funkciulojn kaj varbi esplorstudentojn. Pro tio sufiĉe granda nombro da homoj lernas Esperanton. En la Esp-kurso de la Junnan-a Universitato mi faris enketon inter

26 kursanoj el 12 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj. Inter ili troviĝis laboristoj, ŝtatoficistoj, instruistoj kaj senlaboraj gejunuloj. Iuj el ili kumulis en la provinca aŭ urba Esp-organizaĵo. Ili ĉiuj amas nian lingvon kaj diligente lernas ĝin. En iuj aliaj lokoj esperantistoj post plurmonata aŭ unu-jara studo sukcese trapasis ekzamenon kaj estis promociitaj. Similaj ekzemploj estas tre allogaj por multe strebantaj ĉinaj gejunuloj okupitaj pri laboro, studo kaj hejma mastrumado.

Sed el 200 000 esperantistoj la plej granda parto estas komencantoj, kiuj lernas Esperanton pro scivolemo kaj intereso, kun la celo riĉigi la enhavon de sia vivo. Iu vendisto diris: "Estas scivolemo, kiu min kondukis en tiun kampon kaj mi volas preni Esperanton kiel mian ŝatokupon." Iu sportamatoro diris: "Mi estas laboristo. Lerni Esperanton estas ne utile por mia nuna kaj estonta laboro. La lernado de la lingvo tamen enhave riĉigas mian postlaboran vivon. Esperanto estas mia ŝatokupo, pli bona ol mia fizika laboro, ĉar ĝi postulas nek bonan veteron nek ludkampon." Tiuj gejunuloj, ĝenerale, havas nur rudimentajn sciojn pri Esperanto. Tamen kun tempo-paso iuj forlasos Esperanton, dum aliaj vere esperantistiĝos.

Koncerne la ĉinajn junulojn de la 80-aj jaroj praktikemajn, firmvolajn kaj entuziasmajn, malgraŭ iliaj malsamaj vivceloj kaj strebado, se nur ili kaptos Esperanton kiel ilon en siaj manoj, la

popularigo de tiu verda semo do falos sur iliajn ŝultrojn. Ĉu ili retiriĝos survoje? Mi pensas, ke ne. Ĝuste diris juna kaj promesplena esperantisto: "Ni ja estas praktikemaj, sed ne miopaj. La homo vivas ĉiam por espero. Ni lernas, uzas kaj propagandas Esperanton ja por kapti la hodiaŭon kaj krei la belan estontecon."



Esperanta konversacio

Utilaj informoj pri Ĉinio

de LKK

Pasporto

Ĉiuj eksterlandaj vizitantoj devas teni validajn vizojn donitajn de la ĉinaj aŭtoritatoj. Eksterlandanoj povas peti vizojn de la ĉinaj ambasadoj aŭ konsulejoj persone aŭ pere de la turismaj agentejoj. Tiuj, kiuj estas en Hongkongo povas peti de la Viza Oficejo de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Ĉina Popola Respubliko.

Dogano

1. Ĉe la alveno al aŭ eliro el Ĉinio eksterlandanoj devas pleni la formularon "Pasaĝera Valiza Deklaracio" kaj prezenti al la Dogano por kontrolado.

2. Eksterlandaj vizitantoj rajtas enporti sen dogano la kutimajn objektojn en racia kvanto por persona uzo, inkluzive de du boteloj da vino (ne pli ol 750 g. por ĉiu) kaj 400 cigaredojn. Brakhorloĝo, kasetaparato, fotilo, kinokamerao, videokamerao povas esti enportitaj kun dogana registrado kaj devas esti reelportitaj.

3. Estas malpermesate en- kaj elporti objektojn kiujn la dogano trovas malutilaj al Ĉinio.

4. Estas malpermesate en- kaj elporti objektojn por aliaj.

5. Fakturoj pri la aĉetitaj juvelo, jado, oraĵo, arĝentaĵo, metiartaĵo, kaligrafaĵo kaj pentraĵo devas esti bone konservataj kaj montritaj al la dogano ĉe la eliro.

6. Necesas prezenti al la dogano specialan ateston donitan de la Ĉina Administrejo pri Kulturaj Restaĵoj por elporti kulturajn restaĵojn el Ĉinio.

7. Renminbi (RMB, ĈINA MONO), armiloj kaj municio, narkotaĵoj, mortigaj eksplodaĵoj kaj radio-dissendiloj kaj ties riceviloj estas malpermesataj porti en kaj el Ĉinio.

8. Turistoj vojaĝantaj tra Ĉinio povas uzi 8-milimetrajn kinokameraojn kaj 1/2-colajn videokameraojn, sed la filmoj kaj videobendoj ne povas esti uzataj por komerca celo. Kinokameraoj super 16mm. (inkluzive de 16mm.) kaj videokameraoj por 1-cola bendo estas malpermesataj enporti en Ĉinion por uzo.

9. Ĉiuj antikvaĵoj elportotaj aŭ sendotaj el Ĉinio devas esti ekzamenitaj kaj vakse sigelitaj de la Ĉina Administrejo pri Kulturaj Restaĵoj antaŭ la eliro. Nenia eldoganigo povas esti donita al la objektoj kiuj ne estis ekzamenitaj kaj vakse sigelitaj de la Ĉina Administrejo pri Kulturaj Restaĵoj, kvankam vere deklaritaj al la dogano fare de iliaj posedantoj. Tiuj objektoj, kiuj ne estis deklaritaj fare de iliaj posedantoj aŭ false deklaritaj, devas esti rigardataj kiel kontrabandaj varoj.

Kvaranteno

I. Neniu atesto pri variola vakcino estas postulata, escepte de pasaĝeroj el aŭ tra variolo-infektitaj regionoj kun ilia restado de pli ol 14 tagoj tie.

Pasaĝeroj el aŭ tra la regionoj, kie la flava febro estas reganta, estas postulataj montri ilian validan ateston inokulan de flava febro.

2. Pasaĝeroj, kiuj sentas malsaneton survoje al Ĉinio, devas raportigi al la ĉina landlima kvarantena oficejo ĉe la flughaveno, marhaveno aŭ fervoja stacio ĉe la alveno.

3. Enirantaj pasaĝeroj devas pleni la formularon "Sana Deklaracio" kaj obei la landliman kvarantenan regularon de la Ĉina Popola Respubliko kaj aliajn regulojn rilate al ĝia praktiko.

Alveno

La Ĉefurba Flughaveno de Pekino estas sufiĉe malproksima de la urbocentro. Estas bezonataj 45 minutoj de tie ĝis la kongresejo kaj hoteloj kie vi loĝos. La Pekina Fervoja Stacio situas en la orienta parto, dum la kongresejo kaj hoteloj en la okcidenta. La 15-kilometra distanco postulas preskaŭ 45-minutan aŭtoveturadon pro malfacila trafiko en la urbo. Tial ni petas vian afablecon precize indiki la daton de via alveno kaj foriro, honron kaj numeron de via transportilo, por ke ni povu ĝustatempe veturigi vin.

Mono

La ĉina mono estas nomata Renminbi (RMB). La baza unuo de RMB estas Yuan (Ĵuano), en kiu estas 10 Jiao (Ĝjaŭ) aŭ 100 Fen. Yuan kaj Jiao estas biletoj kaj Fen moneroj. Ekzistas biletoj en valoro de 1, 2, 5 kaj 10 Yuan kaj de 1, 2 kaj 5 Jiao kaj ekzistas moneroj en valoro de 1, 2 kaj 5 Fen. La valoro de unu Yuan estas proksimume 0,30 usona dolaro aŭ 0,85 nederlanda gul-

deno (en la fino de januaro 1986).

Atesto de eksterlanda valuto egalvalora kiel RMB

Por faciligi al eksterlandaj turistoj vojaĝon en Ĉinio, la Ĉina Banko emisiis specialan monon "Atesto de eksterlanda valuto", kiu estas samvalora kiel RMB. Ni nomas ĝin ĉina turista mono. Ekzistas monbiletoj en valoro de 100, 50, 10, 5, 1 Yuan kaj de 5 kaj 1 Jiao. Ili povas esti uzataj de eksterlandaj vizitantoj en difinitaj lokoj interne de Ĉinio.

Ŝanĝeblaj eksterlandaj monoj

Eksterlandaj monoj de la sekvantaj 17 landoj kaj regionoj povas esti ŝanĝitaj en la ĉinan turistan monon: Aŭstralia dolaro (A\$), Aŭstria silingo (Sch), Belgia franko (BF), Kanada dolaro (Can\$), Dana krono (DKr), marko de F. R. Germanio (DM), Franca franko (FF), Japana jeno (¥), Malazia dolaro (M\$), Nederlanda guldeno (FL), Norvega krono (NKr), Singapora dolaro (S\$), Sveda krono (SKr), Svisa franko (SF), Sterlinga pundo (£), Usona dolaro (US\$) kaj Hongkonga dolaro (HK\$).

Monŝanĝejo

En ĉiuj hoteloj kaj internaciaj flughavenoj de Ĉinio troviĝas giĉeto por ŝanĝi monon. Oni donas la ateston "Monŝanĝa Memorando". Vi povas reŝanĝi monbiletojn de la ĉina turista mono en la monŝanĝa giĉeto ĉe la eliro per la nomita atesto, se restas al vi iom da ĉina turista mono.

Elektro

En Ĉinio la elektra tensio estas 220-volta, alterna kurento. Kontaktiloj ĝenerale estas du-polusaj rond- aŭ plat-formaj, la tri-polusaj ofte en grandaj hoteloj.

Horsistemo

Ĉinio ne praktikas horŝanĝan sistemon, tial somere la horo en

Ĉinio estas 8 horojn antaŭ tiu de Greenwich.

Urbotrafiko

Pekino estas sufiĉe granda urbo kun pli ol naŭ milionoj da loĝantoj, tial la trafiko estas tre peza. Publikaj aŭtobusoj kaj trolebusoj kaj bicikloj estas la ĉefaj transportiloj, taksioj estas ne tiel facile preneblaj escepte en grandaj hoteloj. La aŭtobusoj linioj 332-a kaj 320-a preterpasas la kongresejon. Se vi volas unu- aŭ arope veturi al la urbocentro, vi povas preni la aŭtobuson linion 332-an ĝis la Pekina Zoo post 5 haltejoj. De tie vi povas atingi aliajn partojn de la urbo per aŭtobusoj aŭ trolebusoj. Per la

aŭtobuso linio 320-a, vi povas atingi Muxidi, de kie vi povas veturi al la urbocentro per aŭtobusoj aŭ subtera tramo.

Trinkmono

En Ĉinio oni ne akceptas trinkmonon. Tamen oni ĝojas pri memorindaj donacetoj.

Vetero

La kongreso okazos dum la varma kaj pluva sezono de la jaro. Bonvolu nepre porti pluvmantelon aŭ ombrelon.

Eble estas utila la suba tabelo de la meza temperaturo de 15 urboj en julio kaj aŭgusto, kiujn kongresanoj vizitos antaŭ aŭ post la Kongreso.

Meza Temperaturo

(laŭ Celsiuso)

Urboj	Julio	Aŭgusto
Pekino	26	24,6
Lasao	14,9	14,1
Kunming	19,9	19,2
Harbino	22,7	21,4
Shenyang	24,6	23,7
Xi'an	26,8	25,8
Ŝanhajo	27,9	27,8
Kantono	28	28,2
Nankino	28,2	27,9
Suzhou	28,2	28,1
Guilin	28,3	27,8
Hangzhou	28,7	28,2
Chongqing	28,6	28,4
Wuhan	29	28,5
Chengdu	29,7	30,1

BRONZA TIGRO

La bronza tigo estis aŭtentikiga objekto pri komand-povo super armeo en la antikveco de Ĉinio.

La dramo temas pri la evento "ŝteli la bronzan tigon por savi la regionon Ĝaŭ", registrita en historiaj libroj de Ĉinio.

En 262 a.k. okazis batalo inter regnoj Ĉin kaj Ĝaŭ, pli ol 400 mil soldatoj de Ĝaŭ estis mortigitaj kaj la ĉefurbo estis en danĝero. Ĝaŭ petis helpon de la regno Ŭej. Timante atakon de Ĉin la reĝo de Ŭej rifuzis la peton. Sed Princo Ŝinling, duonfrato de la reĝo, dank' al helpo de Juĝji, kromedzino de la reĝo, sukcesis ŝteli la bronzan tigon por manovrigi la armeon, kaj sekve li eldanĝerigis Ĝaŭ.



La aŭtoro Gŭo Mojŭo (1892-1978) estis eminenta ĉina verkisto, poeto, historiisto, dramisto, arkeologo, paleografo kaj fama socia aktivulo. En 1921 lia unua poemaro "Diino" aperis kaj per tio li fariĝis pioniro de la moderna poezio de Ĉinio. Li verkis "Bronza Tigo" en 1942, ĝuste en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, por vekti ĉe la popolo patriotismon kaj batalvolon. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, li funkciis kiel prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kaj prezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoj. Li estis produktiva, kaj liaj ĉefaj verkoj jam kolektiĝis en la 17 volumoj de "Verkoj de Gŭo Mojŭo", kelkaj el liaj verkoj jam havas plurajn fremdlingvajn versiojn kaj riĉigas la mondan literaturon.

Formato: 148 × 210 mm 138pĝ.

Prezo: £ 2,90 US\$ 5,90

Numero: 10-Es-1954S

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de
Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta
Sekcio, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Konkurso por teatraĵo de EVA

1. Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) organizas jubilean internacian konkurson por verkado de ORIGINALA TEATRAĴO EN ESPERANTO.

2. Partopreni la konkurson povas ĉiu esperantisto sen ia ajn limigo (krom la membroj de la juĝantaro kaj iliaj familianoj).

3. Unu konkursanto rajtas konkursi per maksimume du verkoj.

4. La konkursaĵo devas esti aŭ

- memstara originala teatraĵo verkita en Esperanto, aŭ

- teatrigo de jam ekzistanta verko originale verkita en Esperanto.

5. La konkursaĵo devas esti normala teatraĵo kun daŭro de unu horo ĝis horo kaj duono.

Ĉiu teatraĵo devas havi minimume 5 rolantojn.

6. Honore al la jubilea jaro, la temo de la teatraĵo estu ĉerpita el la unuaj tempoj de Esperanto.

7. La aŭtoro identigas sin nur per kaŝnomo, kaj sendas samtempe al la sekretario de la Konkurso sigelitan koverton kun sia vera nomo kaj adreso. Sur la koverto estos skribita nur la kaŝnomo, kaj ankaŭ la nomo de la konkursaĵo.

8. Anticipe elektita juĝantaro el tri personoj prijuĝos la konkursaĵojn kaj aljuĝos tri premiojn kaj tri honorajn menciojn. Krom la tri juĝantoj estos elektitaj an-

kaŭ tri anstataŭantoj, por anstataŭi iun en kazo de neceso.

9. La PREMIOJ konsistos el:
UNUA PREMIO: 1000 usonaj dolaroj

DUA PREMIO: 500 usonaj dolaroj

TRIA PREMIO: 250 usonaj dolaroj

Tiuj ĉi premioj estos financataj per donaco de la Internacia Fondaĵo Antoni Grabovski.

La tri honoraj mencioj estos sen financa efiko.

10. La gajnintoj de monpremioj devigas sin:

- alsendi unu kopion de la premiita teatraĵo al s-ro Adamo Goralski, fondinto de la Internacia Fondaĵo Antoni Grabovski;

- Kontribui al la Internacia Fondaĵo Antoni Grabovski: la gajninto de la UNUA premio per du kuponoj en valoro de 100 usonaj dolaroj, kaj la gajnintoj de la DUA kaj la TRIA premioj per po unu kupono en valoro de 50 usonaj dolaroj.

11. La teatraĵo premiita per la UNUA premio estos prezentita dum la Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, en 1987. Post tio la aŭtoroj retenos siajn aŭtorajn rajtojn.

12. La teatra trupo kiu prezentos la premiitan teatraĵon dum la

UK en Varsovio estos premiita per la sumo de 1 250 usonaj dolaroj. Ankaŭ tiu ĉi premio estos financata de la Internacia Fondaĵo Antoni Grabovski.

13. La limdato de la alsendo de la konkursaĵoj estas la 30-a de septembro 1986.

14. La juĝkomisiono donos sian prijuĝon ĝis la 30-a de decembro 1986, kaj la solena premiado okazos dum la UK en Varsovio.

Konkursaĵojn bonvolu sendi al la Konkursa Sekretario:

Spomenka Štimec, N. Dimić 14, 41410 VEL. GORICA, Jugoslavio.

EVA



Sennoma floro


Sur strato mi hazarde vidis floron, grandan kiel ĉina rozo. Ĉe la unua vido ĝi impresis ordinare. Laŭdire ĝi estas blanka en la komenco kaj subtenata de verdaj folioj. Kun ĝia kreskado ĝiaj petaloj nerimarkite fariĝas dikaj verdaj folioj kaj subtenas tiam la novajn blankajn florojn. La afero tiel ripetiĝas senfine.

Kiam mi atente rigardis la florplanton, mi rimarkis, ke ĝi estas tiel bela. Ĝia blanka floro dancis en venteto akompanate de ĝiaj

verdaj folioj. Vere ĉarmis la floro kaj ĝin bone subtenis la folioj. Antaŭ la sennoma floro mi longe staris kaj ne volis foriri.

Kiel similas al la homa vivo la floro: La homo havas siajn junecan, mezaĝon kaj maljunecan kaj ĉiu tempo ludas sian apartan rolon.

Mi preferas la simplan naturecon de sennoma floro al la pompcon de peonio, delikateco de kizantemo, krudeco de kapoko kaj gracieco de narciso.



Tarifo: 1 internacia respondkuponno por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * 24-jara Wang Fu (teknikisto) dez. kor. tutmonde pri ĉ.t. kaj interŝ. pm., pk. kaj E-eldonaĵojn. Adreso: Shan Dan Junma 2 Chang, Lanzhou Junqu, Gansu-provinco, Ĉinio.
- * Gekamaradoj el Wanxian Shi Esp.-Kurso dez. kor. tutmonde pri historio, politiko, literaturo ktp. esperante, angle aŭ germane. Adreso: Yi Jia Zhuang strato No. 92-401, Wanxian Shi, Sichuan-provinco, Ĉinio.
- * Zhang Liping, 28j. bibliotekisto, deziras korespondi tutmonde esperante, angle pri ĉiu temo. Adreso: 601-shi 960-nong, Longshui Beilu 16, Shanghai 200232, Ĉinio.
- * 27-j. teknikisto dez. kor. pri ĉ.t. kaj interŝ. bk., pm. kaj pk. esperante, germane kaj angle. S-ro Chen Xiang-hua, Dong Yang Shan Lu 94, Ganzhou-Shi, Jiangsi-prov., Ĉinio.
- * Ĉinaj esperantistoj dez. kor. pri muziko, sporto kaj ĉiutaga vivo, kaj interŝanĝi pm, pk. kaj esperantaĵojn. Skribu al: Ma Shuguang (ŝoforo 27-j.), Taizhou Diwei Tongzhan Bu, Linhai, Zhejiang, Ĉinio, Su Shiming (komizo 22-j.), Linhai Shuichan Gongsi, Linhai, Zhejiang, Ĉinio.
- * 26-jara Adam Seroczynski dez. kor. tm. pri turismo, antikva historio kaj parapsikologio, kaj kolekti bk. 59-220 Legnica Str, Hutnikow 11/5, Pollando.

(Daŭrigo sur p. 68)

LA GANSU-A ESPERANTO-ASOCIO FONDITA

La 12-an de januaro, 1986 la Gansu-a Esperanto-Asocio solene okazigis sian fondkunvenon en la urbo Langōŭ. En ĝi oni laŭtlegis gratulajn leterojn kaj telegramojn de en-kaj eksterlandaj Esperantaj organizaĵoj kaj individuoj.

S-ro B. Vogelmann, honora membro de UEA kaj fama esperantisto de FR Germanio, sendis gratulan leteron kaj cent markojn al la Gansu-a Esperanto-Asocio por esprimi sian profundan senton al la Gansu-aj esperantistoj. Krome, s-ro Tokuda Rokuro, prezidanto de la Ŝizuoka Esperanto-Societo de Japanio, Albert Claesen, sekretario de la Esperanto-klubo Hasselt de Nederlando, sendis gratulan leteron al ĝi. S-ro Mori Singo, vicprezidanto de la Hukuoka Esperanto-Societo sendis al la asocio akrostikon, en kiu la unua litero de ĉiu verso formas la vorton Esperanto.

La kunveno aprobis la statuton kaj elektis 29 personojn kiel ĝiajn konsilantojn.

“TUTMONDAJ SCIENCIOJ K TEKNIKOJ” ELDONITA

La Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akade-



Liŭ Ŝjaŭlan (la dua de maldekstre) parolas kun s-ro Mori Singo (la unua de maldekstre), peranto de EPC, dum sia vizitado en Hukuoka.

mio de Sciencioj fondis la gazeton “Tutmondaj Sciencioj k Teknikoj”. Ĝi estas la unua trimonata scienc-teknika gazeto de Ĉinio en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies celo estas konigi la disvolviĝon de scienco kaj tekniko kaj fari internacian akademian interŝanĝon. Ĉu Tunan, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj prezidanto de la societo “Amikoj de Esperanto”, Lu Ĝjaŝji, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencioj, kaj aliaj skribis gratulajn vortojn por la gazeto, emfazante la gravan signifon de Esperanto kaj ĝian pozicion en la kampo de scienco kaj tekniko. Ĉiu numero de la gazeto aperigas vortojn de ĉinaj eminentuloj, scien-

cistoj kaj altrangaj inĝenieroj pri la rolo de Esperanto en la scienca kaj teknika kampo, krome ankaŭ artikolojn de scienco kaj tekniko, akademiajn disertaĵojn kaj raportojn verkitajn Esperante aŭ esperantigitajn de veteranaj esperantistoj, sciencistoj kaj inĝenieroj kaj teknikistoj en- kaj eksterlandaj. La adreso de la redakcio: Sekretariejo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencioj, Sanlihe, Bejing, Ĉinio.


UNUA PAŜO EN SANTA BARBARA

Dek-semajnan bazan Esperanto-kurson ĉe la Universitato de Kalifornio en Santa Barbara aranĝis Prof. Albert Lindeman kaj gvidis Dorothy Holland kaj Arthur Eichenberry. Estas la unua fojo, ke tia kurso aperis en la universitata studplano. Dum 1986, oni planas dufoje ripeti tian kurson, kaj en la aŭtuno oferti ankaŭ mezgradan kurson.

Ekspozicio de Esperanta literaturo kaj Esperantaĵoj troviĝos en la universitata biblioteko dum tiu tempo.

LA FILINO DE VERDA MAJO EN JAPANIO

S-ino Liŭ Ŝjaŭlan, la filino de la



La fondkunveno de la Gansu-a Esperanto-Asocio



S-ino Dorothy Holland en E-ekspozicio de la universitata biblioteko en Usono

forpasinta pac-batalantino esp-ino Verda Majo, vizitis la urbon Hukuoka en la mezo de decembro, 1985, antaŭ ol fini sian studon en Tokio (marto 1986). Ŝi estas 39-jara instruistino de iu universitato en Pekino kaj venis al Japanio en novembro, 1984.

Nemalmultaj ĉinoj kuraĝigis kaj helpis finance por ke ŝi sukcese studu en Japanio. Tio plifortigis la amikecon inter la du landoj.

VIZITADO DE ANGLA ESPERANTISTO TRA EŬROPO

S-ro Frank Buckley, multjara sperta esperantisto, prezentis lerte elektitan kaj profesie produktitan antologion de Esperantaj verkoj kaj kantoj en lumbild-sonbendo kun la titolo "50 Jaroj de Esperanto". Por festi sian 70-an datrevenon li vizitis, vizitas kaj vizitos la plej aktivajn Esperantajn klubojn tra Eŭropo. Dum 1986 li vizitos Portugalion, Svislandon kaj Italion.

Dum 1987 li vizitos la orientan Eŭropon.

S-ro Frank estas angla advokato. Li ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto okazinta en Kolonja (Köln) en 1933 kaj sukcesis en la ekzamenoj por la diplomo de la Brita Esperanto-Asocio en 1942 kaj 1949. UEA donis al li la honoron de Dumviva Membro. Li tradukis multe da dramoj kaj komedioj kaj multe laboras por Esperanto-propagando.

ESPERANTO PROGRESAS EN LONDONO

En la tria ŝereco-festo okazigita la 20-an de februaro, 1985, en la Parlamentejo de Londono partoprenis 42 parlamentanoj. Inter ili troviĝis dek sep personoj, kiuj ne estis membroj de la Esperanta Parlamenta Grupo. Multaj mencioj kaj novaĵoj aperis en la naciaj radio kaj ĵurnaloj. Nun la Esperanta Parlamenta Grupo kreskis ĝis 173 membroj. Estis rimarkinde, ke jam plenumiĝis multe da pozitiva sinteno pri Esperanto kaj pluraj sugestoj kaj proponoj faritaj en tiu festo. La rezultoj de la festo montris la plu kreskantan progreson de Esperanto.



Parlamentano f-ino B. Brooks (la kvara de maldekstre ĉe la fronto) kun esperantistoj kaj aliaj parlamentanoj en la "Vino kaj Fromaĝo-festo" de la Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo en 1985

La plej kara...

(Mikronovelo)

Kiam ni ambaŭ estis en pasia amo, ŝi oficvojaĝis al Ŝjiŝuangbanna kaj mi al la plej suda insulo Hajnan. Ni sopiris unu la alian kaj sukcesis korespondi. Ŝi ĝoje skribis al mi, ke reveninte al Pekino, ŝi donacos al mi memorajon propran al la loko, kiun ŝi opiniis la plej kara en la mondo. Mi respondis, ke ankaŭ mi pretigis por ŝi valoran donacaĵon, akiritan en la plej suda angulo de la lando, certe ne malpli karan ol la ŝia.

Ĉiutage ni provis solvi la enigmon: kio estas la donacaĵo de la amato.

Post unu monato mi revenis la unua al Pekino. En iu neĝa mateno, post kelke da tagoj, an-

kaŭ ŝi revenis. Mi iris al la stacidomo por renkonti ŝin kunportante la donacaĵon.

Ni renkontiĝis en la vagono. Ŝi longe rigardis min per la flagrantaj okuloj plenaj de mildeco kaj amemo. Ŝi flustris al mi: "En tiuj tagoj, ju pli mi sopiris vin, des pli malklariĝis via vizaĝo en mia memoro." Ĉe tio ekbrilis larmoj en ŝiaj okuloj.

Ŝi havis nur unu valizon. Mi portis ĝin. Apenaŭ ni atingis la placon antaŭ la stacidomo, trapasinte la homplenan tunelon, ŝi tuj deprenis de mi la valizon kaj malfermis ĝin. Ĵetinte al mi petolan rigardon, ŝi ordonis al mi deturni la vizaĝon kaj haste fositadis en la valizo.



de DENG ZONGLJANG

Faladis neĝflokaj. La frosta aero estis saturita de freŝa aromo propra al neĝa tago.

Jam pasis 5 minutoj, kaj mi ankoraŭ ne ricevis ŝian informon. Mi returnis la vizaĝon kaj vidis ŝin ĉagrenite staranta kun ŝviteta frunto kaj kuspita nazo. La valizo malfermite kuŝis sur neĝo kun malorda enhavo. Evidente ŝi ne trovis kion ŝi volis.

Mi demandis, sed ŝi silentis.

Ŝi refoje kaŭriĝis kaj rapideme fositis en la valizo. Ŝi stariĝis, rapidege priserĉis ĉiujn siajn poŝojn, sed vane. "Kiel eble? ne, neniel!" Ŝi etendis la maneton eĉ en mian poŝon! Ŝi palpis per la dekstra mano en la poŝo de mia jako kaj tuj eksaltis de ĝojo.

Ŝia maneto ruĝiĝinta pro frostato atente retiriĝis el mia poŝo, kun mia poŝtuko, kvazaŭ ŝi timus, ke la poŝtuko magie forflugus.

Elfalis el mia blanka poŝtuko ruĝa ampizo (*Ormosia hosiei*). Ĝi glitis tra inter ŝiaj fingroj surteren.

Sur la blanka fono de neĝo okulfrape ruĝis ampizo, kvazaŭ svingiĝanta fajro. La rigardo de ni ambaŭ fiksiĝis sur ĝi. La du koroj forte batis samtakte.

"Kiel ĝi aperis ĉe vi? Vi, ĉiam petolas kun mi!" Ŝi pinĉis per la dik- kaj montro-fingroj la ampizon kaj ĵetis al mi koleretan ekrigardon.

Mi nur respondis per rideto kiel en kutima ŝerco. Mi komprenis, kiel mi povus reteni la ekscitiĝon? Tiutempe mi nenion volis diri. Vere nenion.

Vespere ni rendevuis en la varmeta metrostacio.

“Ĉu vi kunportas la donacaĵon promesitan?” Per tiu demando ŝi komencis la kveradon. Evidente ŝi opiniis ke nun estas la tempo reciproki la karan donacaĵon.

“Mi jam donis al vi, matene, ĉe la stacidomo.”

Ŝi larĝe malfermis la okulojn kaj rigardis min kun konfuzita mieno. Baldaŭ poste la okuloj ekflagris per plena fido al mi. Ŝi ekridis pli dolĉe ol en la mateno, kiam ŝi levis la ampizon de sur la tero.

Tuj ŝi montris ĝeniĝon. Mallevinte la kapon ŝi ne kuraĝis rigardi rekte al mi, kvazaŭ ŝi kulpus kontraŭ mi.

Nun mi devis malkaŝi al ŝi, ke matene, kiam ŝi trovis ampizon sur la neĝo kaj forkuris kun la valizo, mi trovis saman brile ruĝan ampizon sur la loko kie estis kuŝinta la valizo.

Ĉu ni bezonus reciproki la karajn donacaĵojn? Ampizo, brile ruĝa ampizo! Kiu grajno estas la via, kiu la mia, tute ne gravas. Lasu ilin neniam distingeblaj!

ŬEJ LJAŬ:

TELEVIDA PROGRAMO EN PEKINO*

Mia patro loĝas en Fuĝjan-provinco, sudorienta Ĉinio. Li tre malofte vojaĝas, ĉar li ne volas forlasi sian televidilon. Je la sepa vespere la Centra Televida Stacio komencas elsendi “Novaĵojn”, kiujn li nepre rigardas. Se li estas sana kaj ne tro okupita, li ĉiam rigardas programerojn ĝis la fino. Antaŭ ne longe li veturis al Pekino kaj loĝis kelkajn monatojn ĉe mi. En Pekino, krom vizito, li kompreneble rigardis televid-elsendon.

Kun riĉiĝo kaj bonkvalitiĝo de la ĉinaj televidaj programoj, rigardi televidajn programojn jam fariĝis nemankigebla konsistiga parto de la vivo ne nur por mia patro, sed ankaŭ por la diversaj popoloj.

La Centra Televida Stacio havas historion de proksimume 30 jaroj. Ekde 1986, ĝi malfermis tri elsendajn kanalojn. Ĝia elsenda tempo atingas ĉ. 30 horojn po tage. Ĝia unua-programa elsendo kovras 60% de la ĉina teritorio kaj havas 200 milionojn da spektantoj. Ĝi havas pli ol 20 rubrikojn, plaĉajn al ĉiuj rigardantoj, inkl. la informajn “Novaĵoj”, “Hodiaŭa Mondo” kaj “Lokoj de Ĉinio”; la sciajn “Higieno kaj Sano” kaj “Servi al Vi”; la literaturajn kaj artajn “Literaturo kaj Arto de Aliaj Landoj”, “Operoj”, “Kultura Vivo” kaj “Centflora Ĝardeno”; la sportajn “Sporta Revuo” kaj “Sportaj Novaĵoj”, kaj “Ekonomia Vivo”, “Inter Ni”, “Animala Mondo”

k.a. La stacio elsendas krome “Infana Programero”.

Mia malpli-ol-tri-jara filineto aparte ŝatas la infanan programeron. Ŝi, moviĝema, estas kvietita nur en la duonhoro de la programero. La gefratoj, iom pli aĝaj ol ŝi, montris al ŝi novan, interesan mondon.

Rigardinte la programeron “Servi al Vi”, mia edzino havas pli profundan konon pri la frua edukado al infanetoj. Ŝi povas lerte fari glaciaĵon kaj ĉinajn plaĉdojn kun okulplaĉaj koloroj, bonaj odoro kaj gusto imitante la proponitajn metodojn.

Kompreneble, ankaŭ mi akiris multajn sciojn, de tie mi eksciis, kiel interparolis R. W. Reagan

kaj Gorbačov kaj kiel iu okcidenta raportisto estis trafita de hazarda kuglo en ŝtatrenverso de Tajlando.

En Pekino krom la tri elsendaj kanaloj de la Centra Televida Stacio oni ankaŭ rigardas programerojn de la Pekina Televida Stacio. La stacio fondiĝis antaŭ malpli ol 7 jaroj. Nun ĝi havas 15 rubrikojn, inter kiuj estas aparte interesaj la “Novaĵoj de Pekino”, “Sporto”, “Kalejdoskopio”, “Popularaj Sciencoj” kaj “Voĉo de Spektantoj”.

Precipe la programero “Familia Konkurso pri Dek Demandoj en 100 Sekundoj” elsendita de la stacio vekis eksterordinaran interesecon ĉe la rigardantoj. Ekde la Printempa Festo de 1985 ĝi jam faris 17 konkursojn.

La prezidanto faras al ĉiu konkursanto dek demandojn, ĉiun el ili devas ĝuste respondi la konkursantoj en dek sekundoj. Ĉar la programero saĝe aranĝita estas plena de scienco kaj intereso, kaj plie la demandanto parolas kiel malnova amiko, tial ankaŭ la spektantoj sentas la intimecon. Ankaŭ mi kaj mia edzino ŝatas

la programeron. Ni rigardas ĝin ĉiujfoje kun plena atento por respondi la demandon kiel eble plej rapide.

En la Nacia Festo de la pasinta jaro la “Familia Konkurso pri Dek Demandoj en 100 Sekundoj” okazis en la impona Popola Halo. Ĉ. 100 partoprenantoj kaj du prezidantoj ĉiuj estis samaĝuloj kiel la nova Ĉinio — 36-jara. La programero atingis grandan sukceson. Iu scienca laboranto skribis al la televida stacio: “En la Nacia Festo ĉiuj de nia oficejo rigardis la programeron. Mi, unu el la samaĝuloj de la nova Ĉinio, estis pli kortuŝita. Ĝi ne nur vekis ĉe mi rememoron pri la bela kaj feliĉa infaneco, sed ankaŭ pliigis mian fidon al la estonteco kaj moderniga konstruado de la patrolando.”

Krom la supre menciitaj programeroj, la Centra Televida Stacio kaj la Pekina Televida Stacio ĉiutage elsendas almenaŭ unu televidan filmon aŭ filmon. Laŭ statistiko, en 1985 Ĉinio produktis 1 300 televidajn filmojn. Sed inter ili 200 ne atingis la elsendan normon kaj du trionoj estis

banalaj enhave. Tio estas vere maltrankviliga!

En 1985 la televida filmo (en serio) “Familio de Kvar Generacioj” elsendita de la Pekina Televida Stacio ricevis grandan sukceson, kio lumigis la perspektivon de la ĉinaj televidaj filmoj. La televida filmo 28-peca estas adaptaĵo de la samtitola romano de fama verkisto Laŭŝe. La filmo plene enkorporigis la stilon de Laŭŝe kun forta pekina trajto. La kompilado, reĝisorado kaj aktorado kune formis belan harmonian unuiĝon.

En Pekino la televidaj spektantoj ĉiusemajne povas rigardi almenaŭ du fremdajn televidajn filmojn, ekz. tiujn de Japanio, Usono, Sovetunio, Meksikio, Francio, Britio, Brazilo, Jugoslavio, DR Germanio, FR Germanio k.a. Post kiam la brazila televida filmo (en serio) “Sklavino” estis elsendita en Ĉinio, leviĝis manio de “Isaura” (heroino de la filmo) en Ĉinio.

Kun progreso de la ĉina moderniga konstruado, rapide elkulturi diversajn fakulojn fariĝis

La Pekina Kolor-televida Domego




Sceno el la teatro “La Blanka Serpento-virino”



urĝa tasko en Ĉinio. La Centra Televida Stacio kaj la televidaj stacioj provincaj kaj urbaj multe elsendas televidajn edukajn programerojn. La Centra Televida Stacio jam planis 1986-jaran edukon programeron en tri kanaloj, inter ili estas "Kultura Eduko", "Profesia Eduko", "Semajna Kurso", "Enciklopedieto", "Postlabora Lernejo", "Agrikulturaj Sciuj", "Ekonomio kaj Administrado", fremdlingva lernado kaj aliaj.

Nun la ĉina televido estas en sia ora tempo. La Pekina Kolor-televida Domego estos finkonstruita kaj transdonita al uzado en la kuranta jaro, tiam la Centra Televida Stacio elsendos per kvar kanaloj. Samtempe kun tio Gŭangdong, la Interna Mongolio kaj aliaj regionoj konstruas sian kolor-televidan centron. En Lhasa, ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, aperis surtera satelita stacio, kiu komencis ricevi televidan programon de Pekino en la 20-a de novembro, 1984. En la lasta septembro, oni starigis 45 surterajn satelitajn staciojn en nacimalplimultaj regionoj kaj malproksimaj kaj land-

Nova surtera satelita televid-ricevostacio en Lhasa




limaj regionoj, tiel ke la popoloj de tiuj lokoj vidis televidan programon de la Centra Televida Stacio. En Ĉinio nun funkcias ĉ. cent lokaj televidaj stacioj kaj troviĝas 50 milionoj da televidiloj.

Mi kredas, ke post nelonge mia patro povos rigardi programon de la Centra Televida Stacio, kie ajn li vojaĝos.

**Tiu ĉi artikolo estas tradukita je facila nivelo.*

Satira televida programero



Bela monturbo Ĉongĉing

de LI ĈJANG

Fotoj de JAN ĜIN

En sudokcidenta Ĉinio staras impona monta urbo Ĉongĉing ĉe la kunfluejo de Jangzi- kaj Ĝjaling-riveroj. Ĝi estis la ĉefurbo de antikva Ba-regno kaj jam travivis 30 jarcentojn. Nun en la urbo ankoraŭ restas multaj antikvaj vidindejoj. Ĝi altiras per sia longa historio kaj apartaj pejzaĝoj grandnombron da turistoj en- kaj eksterlandaj.

La kunfluo de la du riveroj formis larĝan kaj longan duoninsulon, ke la urbo estas ĉirkaŭata de akvo en tri flankoj. En la urbo alte staras la montoj Eling kaj Pipa. La etaĝdomoj konstruitaj sur la deklivoj formis belan pejzaĝon.

La monta urbo ĉarmas aparte pro la nokta pejzaĝo. Se vi ascendas la monton Pipa ĉe la urbocentro en vesperkrepusko, vi povas vidi sennombrajn lampojn glimantaj kiel lampiroj. Kiam pli kaj pli malheliĝas, la urba iluminado aspektas kiel stelplena ĉielo. Super la riveroj Jangzi kaj Ĝjaling kuŝas pontegoj kiel ĉielarkoj. Sur la pontoj navedas aŭtoj kaj sub la pontoj veturas ŝipoj, kiuj formis brilajn liniojn. Se vi rigardas en ŝipo la urbon, vi vidas tute malsaman pejzaĝon: La monta urbo aspektas kvazaŭ flosanta palaco, la lampumoj kunfandiĝas kun la steloj, kio sentigas al vi, ke vi kvazaŭ migrus en paradizo.

La parko Eling kaj la zoologia ĝardeno en la urbo allogas mul-

tajn turistojn per siaj apartaj stiloj. La parko sidas sur la monto Eŝjangling de la posta parto de la duoninsulo. Sude de ĝi fluas Jangzi-rivero kaj norde Ĝjaling-rivero. La plej interesaj vidaĵoj en la parko estas centoj da envazaj miniaturaj pejzaĝoj, rokaĵoj kaj arboj. Dank' al la multjara flegado de ĝardenistoj, ili fariĝis vivaj artaĵoj. En la zoologia ĝardeno situanta ĉe la sudokcidenta antaŭurbo oni konstruis domojn por pandoj, orfiŝoj, akvobirdoj, basenon por hipopotamoj,


ĝardenon por elefantoj, domon kun artefarita monteto por leonoj kaj tigroj, grandan kaĝon por simioj, tie vivas pli ol 150 specioj de animaloj. La dekelkaj pandoj naskitaj en Ĉinio estas raraj bestoj plej ŝatataj kaj multe fotitaj.

Se vi havos unutagan ekskurson en Norda Termofonta Parko kaj la rezervejo Ĝinjunŝan, certe vi neniam forgesos la spertaĵon. La termofonto distancas de la urbocentro 50 kilometrojn kun be-

Veturiloj ĉe la kajo Ĉaŭtjanmen



*La nova pontego
super Jangzi-ri-
vero*



laj naturaj pejzaĝoj. En la parko estas antikvaj konstruaĵoj kore farbitaj kun verdaj tegoloj, ruĝaj tegmentrandoj kaj skulpta-


ĵoj. La parkon trafluas kalka termofonto kun temperaturo de 28-35°C. Bano en ĝi senlacigos kaj sanigos vin.

Kajoj



Elirinte el la parko, oni povas veni al la rezervejo Ĝinjunŝan. Tie staras naŭ montpintoj 1 000 metrojn super la mara nivelo. La montoj estas kovritaj de multjaraj arboj kaj densaj bambuaroj. Tie kreskas pli ol 1 700 specioj da subtropikaj vegetaloj, inter kiuj estas multaj raraj specioj, ekzemple ginko, taksuso acero kaj metasekvojo, kiun oni nomas "viva fosilio". Kaj pro tio oni nomas la rezervejon arbora parko kaj natura botanika ĝardeno. Cetere la loko ankaŭ estas fama pitoreskejo kaj bona somerumejo.

Ankaŭ sur la suda bordo de Jangzi-rivero ĉe Ĉongĉing estas multaj vidindejoj. 26 kilometrojn for de la urbocentro estas Suda Termofonta Parko, kiu estis konstruita en Ming-dinastio en la postaj jaroj de la 15-a jarcento. La loko karakteriziĝas per fontoj, kavernoj, montoj kaj akvoj. Ĝiaj tri famaj termofontoj ofte kun temperaturo de 40°C. kaj ĝia akvo kun malforte alkala karbono kaj kalcio havas bonan kuracefikon al reŭmatismaj kaj



Parto de la monturbo

haŭtaj malsanoj. La fontakvo kristale klara refreŝigas la banantojn. En la parko troviĝas multaj kavernoj, en kiuj diverspozaj stalaktitoj formis sennombrajn pejzaĝojn. En la Feina Kaverno estas statuo de feino, kiu leviĝis de tie al la ĉielo laŭlegende. Ŝi lasis ĉe la monttallo bantukon kiu poste transformiĝis en falakvon, la floroj disŝutitaj de ŝi kreskas ambaŭborde de la montrivero kiu nomiĝas Flora Rivereto.

La Sudmonta Parko konsistas el kvin montpintoj kun areo de pli ol 400 hektaroj. Tie ondas montoj, verdas pinoj kaj cipresoj kaj punktiĝas inter ili floroj de pli ol 1 000 specioj, el kiuj estas proksimume cent specioj de rododendroj. La parko estas laŭdita kiel korolo de la monta urbo.

Se vi havas sufiĉan tempon, vi povas veturi al la gubernio Dazu distanca de Ĉongĉing pli ol 160 km., por apreci la tieajn belajn ŝtonskulptaĵojn. En la gubernio troviĝas pli ol 50 000 surrokaj statuoj en 43 lokoj, kiuj reprezentas la ŝtonkavernan arton de la malfru-periodaj verkoj de Ĉinio, el ili tiuj de la Norda Monto kaj Baŭding monto estas plej grandskalaj kaj plej famaj.

La delikataj kaj graciaj nordmontaj ŝtonskulptaĵoj ricevis laŭdon de ĉinaj kaj alilandaj turistoj. La Norda Monto havas 290 niĉojn kaj kavernojn kun proksimume 10 000 statuoj, kies plejparto estis skulptita en Tang-dinastio (618-907 p.K.). La homfiguroj estas dignaj kaj grasetaj kaj simple vestitaj. Ĝiaj verkoj en pli posta Song-dinastio (960-1127 p.K.) havas homfigurojn

kun klara temperamento kaj estas elito de la nordmontaj ŝtonskulptaĵoj. El tiuj verkoj la plej altnivela estas statuo de Avalokitesvaro nombranta rozarion, ĝi estas proporcie konvena, digna kaj bela, kun detena esprimo kaj forta vivetoso. La statuo de bodisatvo Samantabhadr sidanta sur milda elefanto havas afablan kaj kvietan aspekton kun sana beleco de orienta virino. Ĝi estis nomita de okcidentaj belartistoj kiel orienta Venuso.

La ŝtonskulptaĵaro de Baŭding-monto en ĉevalhufa formo longas ĉ. 500 metrojn kaj ĉiuj statuoj skulptiĝis sur la orienta, suda kaj norda rokmuroj altaj je 15-30 metroj. Ĝi estis plenumita de Ĝaŭ Fengĝi, fama bonzo de Song-dinastio en 70 jaroj de 1179 ĝis 1249. Ĝi havas historion de pli ol 800 jaroj. La skulpta tekniko estas majstra kaj lakona spegulante vastan kaj profundan vivon kaj havas fortajn naciajn guston kaj lokan koloron. En la rigore aranĝita 19-a ŝtonkaverno, granda alta-reliefo kun sutra teksto, prikantaj vortoj, kvazaŭ bildrakonto notas pri la vivo kaj diversaj sentoesprimoj de la popoloj de Song-dinastio. Tia esprima formo estas unika en la ŝtonskulptaĵaroj de Ĉinio.

Du tagoj estas bezonataj por viziti la ŝtonskulptaĵaron de Dazu-gubernio. Kiam vi adiaŭas la urbon Ĉongĉing, plibone vi veturu malsupren laŭ Jangzi-rivero per ŝipo por ĝui la belan kaj grandiozan pejzaĝon de la Tri Montgorĝoj.





Hotelo en nacia stilo





Belaj vitraĵoj ŝatataj de turistoj




La monturbo en nokto


Fotoj de JAN ĜIN

Akvofalo en la Suda Termofonta Parko





Ŝtonskulptaĵoj en Dazu



Kablotramo super Ĝjaling-rivero

Kaserolo en la tablomezo uzata por prepari pladojn kun apartaj gustoj



Tradicia ĉina arta trezoro—gravurita lakaĵo de Pekino

de LIŬ SUJIN



Lakita vazo kun gravuraĵo



Gravurita lakaĵo pejzaĝa pleto

Marte de 1984 en la Lepsika Printempa Internacia Foiro en la Germana Demokratia Respubliko ĉina gravurita lakaĵo, florkorbo kun pleto gajnis oran medalon kaj la pekina arto sin prezentis al la monda artista rondo. La florkorbo estis farita de metiartisto Du Bingcĉen de la Pekina Fabriko de Gravuritaj Lakaĵoj.

La arto naskiĝis en Ĉinio antaŭ pli ol 3 000 jaroj, sed en Pekino iom malfrue, en Ĵuan-dinastio (1206 — 1368 p. K.), kaj prosperis en la dinastioj Ming kaj Ĉing (1368 — 1911 p. K.). Ili estas famaj tra la mondo pro sia delikata gravurado. En la 20-aj jaroj de la nuna jarcento iu pekina gravurita lakaĵo gajnis oran

medalon en la Panama Universala Foiro.

La pekinaj gravuritaj lakaĵoj havas metalan korpon, kiaj kupro, fera, alumina kaj aliaj kun emajla subtegaĵo, aŭ nemetalan korpon, kiaj ligna kaj laka kun laka subtegaĵo. Ĉiuj estas tegitaj ĉefe per ĉina lako, kovranta ilian korpon ĝis dekoj aŭ eĉ centoj da tavoloj laŭbezono de iliaj formoj kaj desegno. Ili estas ĉefe ruĝe lakitaj kun flava, verda aŭ nigra subtegaĵo. Sur la lakita supraĵo oni faras diversajn pentraĵojn, laŭ kiuj oni poste gravuras delikate kaj fine pretigas la belan artaĵon.

Tiaj lakaĵoj estas metie farataj per dekoj da komplikaj proce-

doj. La farado de ordinaraj artaĵoj daŭras ĝenerale duonjaron, dum tiu de altklasaj pli longe. Ili, diferencaj de lignogravuraĵoj kaj aliaj lakaĵoj, estas originalaj tradiciaj metiartaĵoj de Pekino.

La gravuritaj lakaĵoj de Ming-dinastio lerte faritaj estas simplaj en desegno kaj modestaj en stilo, dum tiuj de Ĉing-dinastio kun versimilaj bildoj estas delikataj en gravurado kun inkrusto. Nun la Pekina Fabriko de Gravuritaj Lakaĵoj heredis kaj disvolvis la tradician arton kaj surbaze de reliefigo kreis kavigan gravuradon kaj donis formon de skulptaĵo al gravurita lakaĵo, tiel ke ĉi tiu ekhavis novan specon.

Gravuritaj lakitaj mebloj



KORAN DANKON!

S-ano Hujacz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, aganta prezidanto de la Ĉina Demokratia Ligo kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, forpasis en Pekino pro malsano la 16-an de januaro

1986. La Universala Esperanto-Asocio kaj ĝia prezidanto s-ro Grégoire Maertens, la Japana Esperanto-Instituto kaj ĝia ĉefdirektoro s-ino Yukiko Isobe, la Nagoja Esperanto-Centro kaj prezidanto de la Ŝizuoka Esperanto-Societo s-ro Tokuda Rokuro tele-

fonis aŭ telegrafis al ni por esprimi sian profundan funebtron pri lia forpaso kaj sian sinceran kondolencon al liaj familianoj. Pro tio ni kore dankas ilin!

Ĉina Esperanto-Ligo

La 25-an de jan. 1986

En la lastaj jaroj la Pekina Fabriko de Gravuritaj Lakaĵoj faris multe da delikataj artaĵoj, inkl. de ŝminkujo malpli ol 3 cm. alta, ekrano ĉ. 3 m. longa, bestoj kaj mebloj en antikva gusto.

La florkorbo kun pleto gravurita de Du Bingĉen ja estas unu el tiaj majstraĵoj. Ĝi montras florgravuran arton kreitan de li en la multjara praktikado. En la florkorbo kun 505-milimetra diametro pompas ĉina rozo, peonio, osmanto, magnolio, umefloro kaj krizantemo. La plantoj ĉarmas kun petaloj malpezaj kaj maldikaj, tigoj interkruciĝaj, floroj kuŝantaj unu sur alia en la korbo kun klaraj strioj. Ĝi estas vere perfekta arta verko!

Estas originala la saniga globo, speco de gravuritaj lakaĵoj, kun kupra korpo. Ĝi facile portebla kaj uzata por lertigi la man-artikojn, estas ankaŭ eleganta metiartaĵo por donaco.

Sur pejzaĝa pleto, alia speco de gravuritaj lakaĵoj, estas vidindaj lokoj kaj historiaj restaĵoj delikate faritaj kaj bele ornamitaj. Tia pleto forte spiranta la trajton de la ĉina tradicia me-

tiarto estas signifa memoraĵo. En 1984, kiam 3 000 japanaj gejunuloj vizitis Ĉinion, ili ricevis po unu pejzaĝan pleton kiel donacon de la Pekina Urba Registaro. La donaco montras profundan amikecon de la ĉinaj gejunuloj kaj pekinaj civitanoj al la japanaj amikoj.

La akvario "Naŭ Drakoj Malkvietigas Maron" kun unu-metra diametro, plena de mita koloro, estas granda artaĵo en la nunaj gravuritaj lakaĵoj. La akvario kun gravuritaj naŭ drakoj malkvietigantaj maron sur la eksteraĵo vermiljone brilas. Ĝi estas impona en formo kaj delikata en gravurado. La drakoj lerte sin volvas, la akvo versimile fluas. Sub la akvario estas kvin brune lakitaj drakoj, kio faras la artaĵon pli okulplaĉe harmonia. Ĝi estas tre eminenta objekto.

La fabriko faris ankaŭ utilan provon ornami meblojn per la arto de lakado kaj gravurado. La artistoj ornamas ĉinstilajn meblojn en la gusto de antikveco per gravurita lakaĵo. Jen ĝojiga paŝo de la arto al praktika uzo.

La pekinaj gravuritaj lakaĵoj estas ŝatataj de la popolo pro sia

eleganta arto, reliefigo kaj nacia pentrarto kaj taŭgaj por longtempa uzado kaj facila konservado. En la lastaj jaroj pekinaj artistoj faris multajn novajn produktojn, kombinante la arton kun uzo de jado, eburo, oro, arĝento kaj emajlo, kiuj donis pli da valoro kaj lukso al la produktaĵoj. La pekinaj metiartaĵoj ludas pozitivan rolon en kontentigo de la merkata bezono, disvolvado de la turisma afero kaj akcelo de la internacia kultura interŝanĝo.

Solvo por plenigo de la blankoj per ciferoj:

En la triangula desegnaĵo la tri nombroj en la eksteraj trianguletoj estu multiplikitaj, kaj la kvociendo de la produkto dividita per 2 estas la nombro de la centra triangulo, t.e. $?(3 \times 4 \times 6) \div 2 = 36$.

En la cirkla desegnaĵo la tri nombroj en la tri cirkloj estu adiciitaj kaj la sumo multiplikita per 2 estas la nombro de la granda cirklo, t.e. $?(5+6+9) \times 2 = 40$.

Dek famaj vidindejoj de Ĉinio

de PI DAŬEJ

En 1985 "Ĉina Turisma Gazeto" iniciatis aktivadon por elekti dek famajn vidindejojn de Ĉinio, kun partopreno de 370 000 balotantoj. La jenaj dek gajnis plej multajn aprobantojn.

LA GRANDA MURO

La orienta konstruaĵo sur la terglobo, kiun astronauto povas klare vidi en spaconaveto, estas la Granda Muro de Ĉinio, kiu estas simbolo de la ĉina nacio kaj ankaŭ unu el la arkitekturaj mirakloj en la homa historio.

La Granda Muro ekkonstruita en la sepa jarcento a.K. konsistas el defendmuroj de diversaj regionoj. Ĝin plikonstruis postaj ĉinaj dinastioj. La hodiaŭa Granda Muro devenis de tiu farita en Ming-dinastio (1368-1644). Ĝi komenciĝas de Jalu-rivero (sed

nun Ŝanhajgŭan-pasejo ĉe Bohajmaro estas kutime rigardata kiel ĝia startpunkto) en oriento kaj finiĝas ĉe Ĝjajugŭan-pasejo de Gansu-provinco en okcidento. Ĝi serpentas inter altaj kaj krutaj montoj kaj tra profundaj kaj mallarĝaj valoj de kvar provincoj, du aŭtonomaj regionoj kaj unu municipo, kun totala longeco de pli ol 6 000 kilometroj.

Al la Granda Muro oni konstruis cent gravajn pasejojn kaj pli ol 10 000 gardoturojn kaj fajrosignalejojn. Badaling, parto de la muro, nordokcidente de Pekino estas ĉefa loko por rigardi la mirindaĵon. Ĉiujare la muron vizitas sennombraj ĉinaj kaj alilandaj turistoj. "Kiu ne atingis la Grandan Muron, ne estas bravulo" jam fariĝis devizo de multaj grimpantoj.

LA PITORESKA GUJLIN

"Riveroj aspektas ja kiel blugaza rubando, montaroj similas multe al verd-jada harpinglo." De la antikveco oni per tiaj vortoj laŭdas la belajn pejzaĝojn de Gujlin.

Gujlin situas en la norda parto de la Gŭangŝji-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono en suda Ĉinio. Ĝia pitoreskejo etendiĝas pli ol cent kilometrojn, trafluata de Liĝjang-rivero. Ĝiaj montoj staras plejparte sur ebena loko kvazaŭ ĉielskrapantaj spadoj. Ĝiaj klaraj riveroj zigzagas inter montoj, kies pintoj speguliĝas en la akvo, kio prezentas ĉinajn pejzaĝajn bildojn. Estas senkomparaj ankaŭ la groteskaj rokoj kaj kavernoj de Gujlin, inter kiuj famas la Kanofluta Kaverno kaj la Sepstela Kaverno, en kiuj ĉarmas stalaktitoj kaj stalagmitoj en diversaj pozoj.


LA OKCIDENTA LAGO EN HANGĜOŬ

La fame konata urbo Hangĝoŭ sude de Jangzi-rivero estas unu el la ses antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. La itala vojaĝisto Marko Polo opiniis ĝin "la plej bela kaj plej pompa urbo en la mondo". Ĝia beleco konsistas en ĝia Okcidenta Lago.

La lago kovras areon de ĉ. ses kvadrataj kilometroj. La digoj Bajti kaj Suti dividis ĝin en kvin partojn, Ŭajhu, Lihu, Jŭehu, Ŝji-

La Granda Muro

Foto de ŜJŬE JANG





Tajhe-halo en la Imperiestra Palaco

lihu kaj Ŝjaŭnanhu, kaj ĝin punktis la insuloj Guŝan, Ŝjaŭjingĝoŭ, Huŝinting kaj Ĵuangongdun. La lago estas triflanke ĉirkaŭita de montoj. En valoj lirlas riveretoj kaj landfamaj fontoj.

La Okcidenta Lago riĉas je vindindaĵoj variantaj laŭ sezonoj. Ĝi plaĉas al pli kaj pli da ĉinaj kaj eksterlandaj turistoj.

LA IMPERiestra PALACO EN PEKINO

La nomita palaco estas la plej granda el la samspecaj palacoj en la mondo. Ĝi portas ankaŭ la nomon "Malpermesita Urbo", kun areo de 730 000 kvadrataj metroj. Ĝi havas elegantajn domojn kun pli ol 9 000 ĉambroj kun plankareo de 150 000 kvadrataj metroj.


Oni konstruis la palacon laŭ ordono de la Ming-dinastia imperiestro Ĝu Di. La giganta laboro daŭris 14 jarojn komence de la 15-a jarcento. En la palaco vivis sinsekve 24 imperiestroj de du dinastioj.

Vizitantoj povas ĝui, antaŭ ĉio, la pompan aspekton, striktan strukturon kaj varian arkitekturon de la palaco. Ilin plej inte-

Foto de **ŜJŬE JANG**

resas la grandaj haloj Tajhe, Ĝonghe kaj Baŭhe sur ok-metre altaj blankmarmoraj bazamentoj. Rigardate de malproksime, la haloj similas al fea domo. Kaj vizitantoj povas satigi siajn okulojn per multegaj valoraj objektoj en la palaco.

La Okcidenta Lago



ĜARDENOJ EN SUĜOŬ

La urbo Suĝoŭ kun historio de 2 500 jaroj estas konata kiel "ĝardenena urbo". El ĝiaj dekoj da ĝardenoj la plej famaj estas antikvaj Ĝŭoĝengĵuan, Liŭĵuan, Canglangting kaj Ŝizilin, destinitaj por feŭdaj oficejoj kaj loĝejoj de altranguloj. Ili, artisme konstruitaj, havas siajn apartajn trajtojn spegulantajn la nacian ĝardenistikan stilon kaj tradician konstruarton de Ĉinio. Kiel konate, la boskoj en la urbo estas proksimaj unu al alia.

HŬANGŜAN-MONTO EN ANHUJ-PROVINCO

La monto situas en la suda parto de Anhuĵ-provinco, kun pitoreska areo de ĉ. 154 kvadrataj kilometroj. Ĝi havas 72 pintojn kun malegalaj altecoj. Ĝiaj tri ĉefpintoj staras pli ol 1 800 metrojn super la marnivelo. Ili

kune kun groteskaj rokoj, nuboj, pinoj kaj termofontoj konsistigas kalejdoskopon naturan belaĵon. Ne estas senkaŭze, ke la antikva ĉina popolo diris, ke Hŭangŝan abundas je ĉinaj vidindaĵoj.

TRI GORĜOJ DE JANGZIRIVERO

La Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero enviciĝas inter la plej grandaj samspecaj gorĝoj en la mondo. Ili etendiĝas inter Bajdiĉeng en Fengĝje-gubernio, Siĉŭan-provinco, en okcidento kaj Nanĝin-pasejo en Jiĉang, Hubej-provinco, en oriento, kun totala longeco de 193 kilometroj.

La gorĝoj nomiĝas Ĉjutangŝja, Uŝja kaj Ŝjilingŝja.

JIJŬE-LAGO EN TAJ'ŬAN

Meze de la plej granda ĉina insulo Taj'ŭan kuŝas Jijŭe-lago (Lago de Suno kaj Luno) sur alta monto. Kun surfaco vasta kaj akvo malhele blua, ĝi estas tre pitoreska, brakumita de verdaj montoj. En ĝi estas Gŭanghŭa-insulo, kiu dividis la lagon en du partojn, Ĉjantan kaj Hoŭtan. Laŭdire, Ĉjantan similis siatempe al ringforma lumo ĉirkaŭ la suno kaj Hoŭtan al duonluno, tial ili ricevis la nomojn respektive Suna Lago kaj Luna Lago. Kaj Lago de Suno kaj Luno fariĝis ilia komuna nomo. Legendo diras, ke ĝi travivis proksimume 15 000 jarojn.

El la famaj ĉinaj lagoj nur Jijŭe-lago ravas turistojn per subtropika ĉarmo. Al ĝia ĉirkaŭaĵo ne mankas historiaj restaĵoj, kiuj manifestas la tradician kulturon de la ĉina nacio.

LA SOMERUMA MONTVILAO EN ĈENGDE

En Ĉengde, fama historia kultura urbo en Janŝan-montaro en

la norda parto de Hebej-provinco, estas iama palaco por Ĉingdinastiaj imperiestroj nomata Someruma Montvilao, kun areo de 5 640 000 kvadrataj metroj. La palaco ĉirkaŭita de dek-kilometre longa zigzaga muro havas pitoreskejojn en la gusto de antikveco kaj dissemitajn elegantajn domojn. En la norda kaj orienta partoj estas 12 imperiestraj temploj portantaj la komunan nomon Ŭajbamjaŭ. Ili, bele konstruitaj kaj brilkoloraj, montras kristaliĝon de la kulturoj kaj artoj de la hana, mongola kaj tibeta naciecoj.

ARGILAJ MILITISTOJ KAJ ĈEVALOJ ĈE LA MAŬZOLEO DE LA UNUA IMPERiestRO DE ĈIN-DINASTIO

La urbo Ŝjian en Ŝenŝji-provinco estas konata kiel natura historia muzeo. Tiu antikva urbo riĉas je historiaj kulturaj restaĵoj, kiujn povas reprezenti ĉefe la argilaj militistoj kaj ĉevaloj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro.

tro de Ĉin-dinastio.

En 1974 oni trovis en loko 35 kilometrojn for de la urbocentro de Ŝjian tri kavojn de argilaj militistoj kaj ĉevaloj enterigitaj kune kun la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio antaŭ 2 000 jaroj. La kavoj distancas unu kaj duonan kilometrojn for de la maŭzoleo. La argilaj militistoj kaj ĉevaloj estas same grandaj kiel la veraj. En la kavoj enteriĝis ĉ. 10 000 argilaj komandantoj kaj soldatoj, pli ol 500 argilaj militĉevaloj kaj pli ol 130 lignaj militĉaroj. Tiuj koloraj armitaj militistoj prezentas ne nur imponan subteran formacion, sed ankaŭ la eminentan skulpturon de Ĉin-dinastio.

Por montri la arkeologian eltrovon al la vizitantoj, la loka registaro konstruis ĉe la kavoj n-ro 1 la muzeon de argilaj militistoj kaj ĉevaloj. La vizitantoj nomas tiun grandiozan subteran muzeon la oka miraklo en la mondo.

Jijŭe-lago en Taj'ŭan



La ĉina vejĉio kaj la internacia interŝanĝo de vejĉi-ludarto

Vejĉio kiel antikva orienta kulturo estas fremda al multaj okcidentanoj, sed ĝin iuj ekkonis kaj pri ĝi forte interesiĝas, ĉar ĝi disvastiĝas nun ne nur en Azio, sed estis ankaŭ enkondukita en Eŭropon en la 19-a jarcento kaj poste en Usonon.

LA LUDO DEVENINTA EL ĈINIO, FURORANTA EN JAPANIO

Kiel heredaĵo de la ĉina antikva kulturo, vejĉio havas historion de ĉ. dumil jaroj. Fakuloj konstatis post esploro, ke la hodiaŭa ludmaniero estis elpensita en la Okcidenta Handinastio (206 a. K. — 25 p. K.). Por ludi vejĉion, oni faras kraditan tabulon preskaŭ kvadratan kun longeco de 43.2 centimetroj kaj larĝeco de 40.5 centimetroj, 19 paralelaj rektaj linioj kaj 19 tiaj linioj perpendikularaj al ili kaj 361 krucpunktoj. Dum ludo oni dismetas ŝtonpecojn sur tiuj punktoj, ne kiel ĉe ludo de ŝako, kies pecojn oni devas meti en kvadratetojn. Cetere, unu meto de ŝtonpeco signifas unu paŝon, kaj tiun ŝtonpecon oni ne rajtas plu movi, krom se ĝi estas englutita (ekstermita) de la rivalo, malsame ol ŝakludo. La rondaj ŝtonpecoj estas faritaj el vitro aŭ porcelano, kun diametro de 2.18 centimetroj kaj meza parto pli dika. Estas sume 181 nigraj kaj 180 blankaj ŝtonpecoj, kies tota-

la nombro egalas al tiu de la krucpunktoj sur la tabulo. Ludas du personoj, unu kun nigraj ŝtonpecoj kaj la alia kun blankaj. La ludo komenciĝas de tiu kun nigraj ŝtonpecoj, kaj ambaŭ flankoj rajtas meti sur ajnan punkton nur po unu ŝtonpecon ĉiufoje. Ili alterne faras dismeton tiel longe ĝis la fino. La taktikoj de vejĉio estas sieĝi kaj kontraŭsieĝi. La venkon gajnas tiu, kiu havas pli da "vivaj" (neekstermitaj) ŝtonpecoj sur la tabulo, kiuj cetere okupas pli vastan terenon.

Vejĉio havis gravan pozicion en la antikva ĉina kulturo. Kiel sepkordo, libro kaj pentraĵo, ĝi estis nepre studenda por nobeloj kaj intelektuloj en la feŭda socio. Tiam ofte laŭ tiuj kvar studobjektoj oni taksis la kapablon kaj klerecon de homo.

Ĉirkaŭ la dinastioj Suj kaj Tang (581 p. K. — 907 p. K.) oni enkondukis vejĉion en Japanion el Ĉinio. Surbaze de longtempa praktikado japanaj vejĉiistoj modifis la antaŭan regularon por variigi la atakon kaj defendon kaj bone apliki la saĝon. Kun la ŝanĝiĝo de la japana socio pro Mejĝi-reformado (1868-1873 p. K.), plivigliĝis vejĉi-ludo. Precipe en la unua duono de tiu ĉi jarcento aperis elstaraj japanaj vejĉiistoj, kiuj rimarkinde disvolvis la strate-

gion kaj taktikojn de tiu antikva ludo, ke ĝi radiis de nova vivforto. La ludo estas tre populara en la moderna Japanio kun pli ol 500 profesiaj vejĉiistoj kaj ĉ. dek milionoj da amatoroj, kiuj konsistigas preskaŭ 10% de la tutlanda loĝantaro. Kontraste kun tio, Ĉinio, la naskiĝlando de vejĉio, havas nur pli ol 20 profesiajn ludantojn.

INTERŜANĜO DE LUDARTO INTER ĈINIO KAJ JAPANIO

En la prospera regperiodo (1662-1796 p. K.) de la Ĉingdinastiaj imperiestroj Kangŝji kaj Ĉjanlong floris vejĉi-ludo. Poste la ĉina feŭda socio dekadencis, ankaŭ la ĉina vejĉi-ludo falis en malprosperon, kiu daŭris pli ol cent jarojn. Pro tio en la unua duono de la kuranta jarcento promesplenaj knaboj kaj junuloj de Ĉinio vojaĝis al Japanio por plua lernado de vejĉi-ludarto.

La malprospera periodo de la ĉina vejĉi-ludo finiĝis nur ĉe la fino de la 40-aj jaroj de tiu ĉi jarcento. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 vejĉi-ludo revigliĝis en Ĉinio. Oni diligente laboris en la 50-aj jaroj kaj elbakis la unuajn vejĉiistojn de la nova Ĉinio, kun la ŝanhaja junulo Ĉen Zude kiel reprezentanto. Ilia debuto kreis kondiĉojn por konkurso inter ĉinaj kaj japanaj vejĉiistoj. En



Nje Ŭejping (dekstre) kaj Hideyuki Fujisawa en la Ĉina-Japana Defia Konkurso de Vejĉi-ludo

Foto de HAN LI

1960 japana vejĉi-delegacio unuafoje vizitis Ĉinion. En 1962 ĉina vejĉi-delegacio unuafoje vojaĝis al Japanio. En la du konkursoj neniu ĉina ludanto venkis eminentan japanan ludanton. En 1963 kaj 1965 Ĉen Zude venkis japanajn ludantojn de la naŭa klaso (oni klasifikis la ludantojn laŭ naŭ klasoj kaj la naŭa estas la plej alta). La ĉinajn vejĉiistojn en la 70-aj jaroj reprezentis la pekina junulo Nje Ŭejping. En 1974 li unuafoje venkis japanan naŭaklasan ludanton. Dum sia vizito al Japanio en 1976 li gajnis ses ludojn kaj perdis unu, kaj pro tio la japanaj kolegoj honore titolis lin per "Ciklono Nje". En la pasintaj 20

jaroj okazis pli ol 30 konkursoj inter ĉinaj kaj japanaj ludantoj, kiuj vizitis unu la alian ofte en jaro.

Inter iliaj ludoj plej menciindas la Unua Ĉina-Japana Defia Konkurso de Vejĉi-ludo komencita oktobre 1984 kaj finita novembro 1985. Ĝi estis la unua kaj grandioza por la ĉinaj kaj japanaj vejĉiistoj dum la lastaj cent jaroj. Ĝin aranĝis la Ĉina Vejĉiista Asocio, la redakcio de la ĉina gazeto "Nova Sporto" kaj la Japana Vejĉiista Societo. Japanio, konata kiel "reĝlando de vejĉi-ludo", sendis al ĝi siajn ok plej eminentajn ludantojn reprezentantajn la plej altan lan-

dan nivelon tiuflanke. Ankaŭ la ok ĉinaj ludantoj estis la plej eminentaj, kvankam malpli aĝaj kaj malpli altklasaj ol la japanaj kolegoj.

Komenciĝis la konkurso. Ĉiu matĉo estis plena de streĉa etoso. Ĉar rivalis la elstaraj vejĉiistoj de la du landoj, la situacio de la ludo estis ŝanĝigema kaj anim-kapta. En la 15 matĉoj la 23-jara ĉina ludanto Ĝjang Ĝu-ĝiŭ el Ŝanŝji-provinco venkis kvin japanajn ludantojn. Sed fine li estis venkita de la japana unuaranga ludanto Kobajaŝi Koiĉi, dek jarojn pli aĝa ol li. Poste tiu japana bravulo venkis sinsekve kvin aliajn ĉinajn ludantojn. En la finalo la 33-jara

Vejĉiistino sur fresko de Tang-dinastio (618-907 p.K.)



ĉina ĉefludanto Nje Ŭejping per sia saĝo kaj energio venkis ne nur Kobajaŝi Koiĉi, sed ankaŭ du aliajn japanajn unuarangajn ludantojn, ke la ĉina teamo gajnis la konkurson per 8:7. Tio estis la plej signifoplena venko de la ĉinaj vejĉiistoj super la japanaj kolegoj dum la pasintaj pli ol 20 jaroj. Kvankam la efektiva forto de la ĉinaj ludantoj estas malpli granda ol tiu de la japanaj, tamen la sukceso de Ĉinio en la konkurso montris la maturecon de la ĉinaj ludantoj kaj la esperon de la ĉina vejĉiludo.

LA ESTONTECO DE VEJĈILUDO

Dum la lastaj jardekoj vejĉiludo estis atentata de multaj landoj. Nun ĝi disvastiĝas en pli ol 30 landoj. Krom aziaj landoj, ankaŭ Britio, Francio, FR Germanio, Aŭstrio, Jugoslavio kaj Usono rapide disvolvis vejĉilu-

don kaj senĉese levis sian ludarton. Jam en 1938 okazis la Unua Eŭropa Ĉampionea Konkurso de Vejĉiludo. Ĝi estis interrompita de la Dua Mondmilito kaj rekomencita en 1959. Nun tian konkurson regule okazigas unufoje ĉiujare la Eŭropa Vejĉiista Asocio kaj la vejĉiista societo de la gastiganta lando.

En la pasintaj jaroj ĉinaj vejĉiistoj ne nur ludis kun japanaj kolegoj, sed ankaŭ kontaktiĝis kun eŭropaj ludantoj. En 1978 okazis en Parizo la 22-a Eŭropa Ĉampionea Konkurso de Vejĉiludo, kiun laŭinvite partoprenis la ĉina ludanto Nje Ŭejping. Tio estis la unua fojo por Ĉinio. Decembron de tiu jaro Britio invitis ĉinan ludanton al sia Novjara Vejĉi-konkurso. Kiel la unuaj gastoj el la eŭropaj vejĉiistoj, la Brita Vejĉi-delegacio vizitis Ĉinion en majo 1979, kaj post tio ne ĉesis la interŝanĝo de ludarto inter Ĉinio kaj Eŭropo.

Rigardante la pasintecon kaj nuntempon de vejĉio, oni havas nenian motivon ne esperi, ke ĝi, antikva kultura heredaĵo brilanta per la saĝo de la homaro, estos komprenata kaj bonvenigata de pli da homoj en la estonteco.

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Titano—atleto el la metaloj

de KE BJAN

Kun la senĉesa progreso de sciencoj kaj teknikoj, la homaro jam povas utiligi multajn metalojn. En la nova teknika revolucio aperis titano, juna atleto el la metala familio.

En 1789 iu brita pastro trovis en magnetitaj ercoj kalksimilan pulvoron. Poste oni konstatis, ke tio estas oksido de nova elemento. Oni nomis ĝin titano por kompari ĝin kun la dio Titano en la antikvaj grekaj mitoj.

Titano estas vigla metalo. Ĝenerale ĝi ne ekzistas sola, sed en formo de oksido. Post pli-olcent-jara penado oni ekstraktis briletan, arĝentkoloran titanon el ĝia oksido. Titano estas multe malpli peza ol fero, unu kuba centimetro da fero pezas je 7.8 gramoj, sed titano — je 4.5 gramoj. La nocio "forteco de unuo" estas ofte uzata en industrio por difini materialan kvaliton, ĝi estas rilatumo de materiala fortenco kaj materiala specifa pezo. La fortenco de unuo de alumina alojo estas 16.7, tiu de altforta ŝtalo 15.4 kaj tiu de titana alojo 21.8, tiuflanke ĝi superis ĉiajn ofte uzatajn metalajn materialojn.

La karakterizaĵoj de titano vekis intereson ĉe aviada industrio. Oni ekipas la plej novtipajn aviadilojn per titan-alojaj pecoj maldikaj, malpezaj kaj malgrandaj. Nun la homaro eniris la epokon de supersona rapideco, kaj en tio la titano faris gravan kontribuon.

Titano havas ankoraŭ multajn aliajn bonajn kvalitojn, kiuj mankas al aliaj metaloj. Titano povas elteni altan temperaturon, dum aluminio perdas sian kvaliton en temperaturo de 180°C. Titano fandiĝas je 1.660°C. kaj povas elteni 500°C. en longa tempo. Titano ne timas malvarmon. Fero fariĝas fragila kaj malforta en 40°C sub la nulo kaj perdas sian uzvaloron, dum titano konservas sian bonan kvaliton en 196°C sub la nulo. Titano povas rezisti al korodo, eĉ la reĝakvo, kiu povas solvi oron, ne povas fari al ĝi ian ajn difekton. Titano ne havas magnetis-

Nova nutraĵo—selen- ricaj manĝaĵoj

de ŜJAŬ MINĈIN

Manko de fero kaŭzas al homo anemion, manko de jodo kaŭzas strumon. Kian malutilon al homo alportas manko de seleno?

Seleno estas etkvanta elemento malmultekonata. Sciencistoj enketis la selenan distribuon en grundo, plantaĵoj kaj manĝaĵoj de diversaj mondpartoj kaj la rilaton inter tio kaj la malsaniga procento de maligna tumor. La

mon kaj ne povas esti magnetita eĉ en forta magnetika kampo.

Estas pli interese, ke titan-nikela alojo havas memorkapablon. Maŝinpeco farita el tia alojo ĉiam povas reakiri la formon projektitan kondiĉe ke oni metas ĝin en certa temperaturo. Oni volvis antenon el tia alojo dekojn da metroj longan kaj metis ĝin en sateliton aŭ spacoŝipon. Sur sia orbito, la anteno povas aŭtomate disvolviĝi, varmigite per elektro. Oni nur ĵus ekkonis kaj komencis utiligi tiun memoran kvaliton de titan-nikela alojo, tial oni ankoraŭ ne povas antaŭtaksi ĝian perspektivon.

Dank' al siaj multaj bonkvalitoj, titano jam ludis ĉiam pli grandan rolon en aviado, spaco-flugo, marnavigado, petrolo, kemio, metalurgia, radioaparata, elektra kaj aliaj industrioj. Laŭtakse, estas 4.1 miliardoj da tunoj da titano ekspluetebla sur nia tergloba. En la estonteco titano certe faros pli multajn kontribuojn al la homaro.

enketo montris, ke la mortokvanto kaŭzita de maligna tumor en hiposelena regiono estas evidente pli granda ol tiu en mezo-selena kaj hiperselena regionoj. Fakuloj de la Tumorologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj faris selenan analizon al la sango de loĝantoj de 24 gubernioj kaj urboj el ok provincoj de Ĉinio, la analizo montris,

ke la mortokvanto kaŭzita de kancero de la homoj kun sango hiperselena estas malgranda kaj la kanceruloj kun hiposelena sango havas altan proporcion de tumoraj difuzo kaj transiĝo kaj altan proporcion de morto.

La enketoj instigis fakulojn komenci esploradon pri rimedoj kontraŭ kanceraj, laŭ la selena kvanto en la homkorpo. Sciencistoj faris multfojajn eksperimentojn al bestoj kaj konstatis, ke doni certan kvanton da seleno al bestoj povas evidente redukti la malsanigan pocenton kaj mortokvanton kaŭzitajn de plurspecaj kanceraj. Dokumentoj diras, ke se oni donas manĝaĵojn kun


aldono de certa seleno al besto kun transplantita tumor, la inhibicia pocento por iuj tumoraj superis 90%.

Tia speciala inhibicia efiko kontraŭ kanceraj vekis atenton. Oni klopodas havigi al si kontraŭkanceran metodon simplan kaj sekuran, t.e. pliigi sorbeblan selenen tenatan en manĝaĵoj.


El la ĉiutagaj manĝaĵoj viando, besta internaĵo, laktaĵoj, marproduktaĵoj entenas riĉan selenen, ankaŭ grenoj entenas certan kvanton da seleno. Ĉinoj konsumas ĉefe vegetalajn nutraĵojn, tial ili prenas ne sufiĉe da seleno el nutraĵoj. Por solvi la proble-

mon la Pekina Manĝaĵ-industria Instituto sukcese provfaris selenriĉan maltan manĝaĵ-aldonaĵon por aldoni ĝin en kukojn, panojn kaj sekajn vermiĉelojn. Lastatempe fakuloj de la Tumorologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj faris komparan eksperimentadon al tiu aldonaĵo kaj usona selena fermento kaj konstatis, ke la inhibicia efiko de selena malto kontraŭ aflatoksino B-1 estas 30-oble pli forta ol tiu de selena fermento, tial ĝi estas ideala kaj sekura selenriĉa aldonaĵo. Nun la Pekina Manĝaĵ-industria Instituto komencis etkvante produkti tiun aldonaĵon por liveri ĝin al manĝaĵ-preparejoj.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Gongĉing-urbeto
2. Ŝjamen
3. Lhasa
4. Ŝjuĝoŭ
5. Ĉongĉing
6. Gujlin
7. Hangĝoŭ
8. Suĝoŭ
9. Ĉengde
10. Ŝjian



“ĈASISTO” EL VASTA ARBARO*

Rigardinte fotojn en la gazeto “Ĉina Fotografio” pri la ĉasista vivo de olunĉun-oj, nacimioritatanoj en nordorienta Ĉinio, nemalmultaj admiris: “Kiel multajn penigajn laborojn oni devis fari por foti tiujn fotojn kun apartaj karakterizaĵoj!”

Jes, tiujn fotojn faris la heroo de mia artikolo, surĉevale postkurante sovaĝbestojn kune kun lokaj ĉasistoj dum dekelkaj tagoj en arbaro kun temperaturo de 40° C sub la nulo.

En iu kunveno en Pekino mi bonŝance konatiĝis kun tiu fotis-


to. Ĉe la unua vido mi trovis lin iom originala inter la multaj ĉestantoj. Kun bruna haŭto, li estis korverŝa, senĝena kaj iom “sovaĝa”. Poste mi okaze aŭdis lin diri al alia: “Nur en la aĝo 39-jara, mi komprenis.” Mi pensis, ke li certe havis neordinaran travivaĵon. Mi intervjuis do tiun viron el vasta arbaro.

Mi donis al li, Ŝju Liĉjun, novan numeron de “El Popola Ĉinio”, kaj li eĉ voĉlegis, kvankam li ne tiel ĝuste prononcis. Li estis lernanto de la Ĉina Korespondanta Esperanto-Instituto. Li diris,


ke li tre ŝatas tiun lingvon, sed li ne havas pli da tempo por ĝin lerni pro multaj laboroj. Li havis ankaŭ alian intereson. Jam en la infaneco li ekamis arton. Fininte la lernadon en la Harbina Instruista Instituto en nordorienta Ĉinio en 1970, li venis al la Granda Ŝing’an-montaro, sin ekokupis pri fotografio en kultura buroo kaj realigis sian deziron longe ne plenumitan.

Post naŭ jaroj Ŝju Liĉjun estis altirita al iu granda gazeta redakcio en Harbin kaj tiel revenis al tiu provinca ĉefurbo, kie

Ŝju Liĉjun (maldekstre) en intervjuo



Arbohakejo en la Granda Ŝing’an-montaro



lia familio havis komfortan domon kaj krome liaj laborkondiĉoj estis bonaj. Sed oni ne komprenis, kial li sentis sin nekontenta.

En tiuj naŭ jaroj la bela kaj severa naturo nerimarkite gravuris en lian kapon impreson tiel profundan, ke li ne povis ĝin forgesi.

Tie li fotis multajn mirindajn pejzaĝojn, kiel ŝtormo en frosta vintro, nigraj nuboj antaŭ pluvego en varmega somera tago, neĝo en malfrua aŭtuno kaj glacio sub verdaj arboj en la komenco de somero. Ili estis arta kristalo ricevita post lia longtempa laborado en arbaro.

Tie olunĉun-oj estis kune kun li de mateno ĝis vespero. Ili ankoraŭ bone konservis sian moron de primitiva ĉasado. Kiom da fojoj Ŝju Liĉjun kun malnova fotilo sekvis olunĉun-ojn, sur longhara ĉevalo de mongola speco, por ĉasi sovaĝbestojn en arbaro! Vespere ili sidis ĉirkaŭ

kampfajro, manĝis duonrostitan bestviandon kaj noktis sur neĝo. La ĉasistoj rigardis lin kiel sian membron. Liaj fotoj "Ĉasado" kaj "Ĉasista Taglibro" aperigitaj surrevue estis faritaj surloke.


Ŝju Liĉjun vivis jaron post jaro kiel ĉasisto. Lin edifis kaj kuraĝis la saĝo kaj sindonemo de la laboranta popolo en batalo kontraŭ sovaĝbestoj. Foje, kiam li surĉevalo postkuris por foti ĉashundon persekutantan kapreolon, lia ĉevalo estis timigita kaj lin deĵetis, ke lia vizaĝo sangis, sed li tuj leviĝis, plenforte postkuris kaj fine kaptis tiun vivan scenon. Alifoje, por subite foti tri ĉashundojn batalantajn kontraŭ apro, li ŝtele proksimiĝis al ĝi, sen teleobjektivo, sed la apro, je 3-4 m. for de li rimarkis lin kaj furioze sin ĵetis al li. Poste li eldangeriĝis sub helpo de ĉashundoj kaj ĉasistoj.

Li pasigis pli ol 250 tagojn jare en montarbaro. Li estis en


pli ol cent arbohakejoj, minejoj kaj vilaĝoj. Li bone konis la tiean veteron, la tieajn montojn, riverojn, birdojn, bestojn, arbojn, florojn kaj herbojn. Li sciis, kiam kaj kie li povas fari kiajn fotojn. Li iam faris tian koloran foton: sunradioj ridis vespere el densa nubaro kaj oranĝe kolorigis la montaron kaj arbaron. Velka arbo maldekstre donis al la foto poezion: Antaŭ malšana arbo ĉiuj aliaj estas en printempa prospero. La foto karakteriziĝis per densaj koloroj, klara kontrasto, riĉa imago kaj profunda poezio. Tiu "Verda Monto sub Vespera Suno" estis elektita de la redakcio de la bildgazeto "Ĉinio" por ĝia kalendaro de 1982. Ŝju Liĉjun diris al mi: "La foton mi hazarde faris revenvoje en iu vespero." Tiam li kune kun ĉasistoj iris en bruligita arbaro kaj antaŭ ili estis nur kalva monto, velkaj arboj, malalta kverkaro, nigra nubaro... ĉio en dezerteco kaj obskuro. Subite sunradioj verŝiĝis sur kverkaron, donante viv-energion al la ĉirkaŭaĵo, kaj la pejzaĝo fariĝis belega. Malgraŭ la laceco, li saltis de sur la ĉevalo, rapidis al montdeklivo. Apenaŭ li faris du fotojn, la suno denove sin kaŝis en la nubaro kaj la bela pejzaĝo elvapiĝis. Ĉu la foto estis farita hazarde? Jes. Se la aŭtoro ne havus pasion al tio, se li ne amus la vivon nek konus la trajtojn de la Granda Ŝing'an-montaro nek sin kulturis ĉiutage per arto.

Ŝju Liĉjun sopiris ankaŭ la arbohakistojn. Foje li konatiĝis kun iu ŝoforo dum sia fotado de vinttra transporto en arbohakejo. La ŝoforo transportis 10 000 kubmetrojn da ligno jare. Pro tio li ricevis la nomon "dek-mil-kubmetra ŝoforo". En la plej laborplena vintro li laboradis tagojn kaj noktojn senĉese, ke li tuj en-

Sledoj sur neĝo



Boatoj de olunĉunoj



dormiĝis dum manĝado en la hejmo. Timante, ke akcidento okazos al li, lia edzino enpoŝigis al li plenmanon da ruĝaj kapsikoj kaj diris al li, ke li manĝu ilin, kiam dormemo lin kaptas dum lia veturigado. Sed fine li glorie mortis pro troa laceco. Kiam oni lin levis, el lia poŝo ruĝaj kapsikoj elglitis sur la neĝkovritan teron. Ĉiufoje, kiam Ŝju Liĉjun rememoris tiun scenon propraokule viditan, li estis plena de emocio.

Finfine li komprenis, ke li radikiĝis en la vasta arbaro, kie ĉio estas konata por li, kaj kie estas liaj ĝojo kaj ĉagreno. Do li denove iris la herban vojon al sia vasta arbaro.

Kiel elstara "ĉasisto", Ŝju Liĉjun lerte ĉasis brilajn kaj ŝanĝiĝemajn spektaklojn en la vasta arbaro. La sukcesoj en lia diligenta laboro estas rimarkindaj. Li aperigis siajn pli ol 500 fotojn


kaj artikolojn kun dekmiloj da idegrafiaĵoj en landaj, provincaj kaj urbaj ĵurnaloj kaj bildgazetoj kaj eldonis la albumojn "Smeralda Arbaro", "Granda Ŝing'anmontaro" kaj "Verda Trezorejo". Liaj eminentaj verkoj dufoje montriĝis en la internacia fotoeks-

pozicio okazigita en Pekino kaj estis plurfoje ekspoziciitaj en Usono, Japanio, Jugoslavio kaj Hongkong. Lia foto "Olunĉunaj ĉasistoj" gajnis premion de la azia kultura centro en Japanio.

**Tiu ĉi artikolo estas tradukita je facila nivelo.*

Norda Ĉinio en aŭtuno

Fotoj faritaj de Ŝju Liĉjun



KURANTAJ AFEROJ

DUOBLIGIS LA TOTALA PRODUKTOVALORO DE LA ĈINA INDUSTRIO

La totala produktovaloro de la ĉina industrio en 1985 atingis 823.8 miliardojn da jŭanoj (ĉ. 3.2 jŭanoj egalas al unu usona dolaro), duoble pli multe ol tiu de 1978.

En 1985 Ĉinio komplete reformis sian industrion. Rilate al la planizita administrado reduktiĝis la instrukcia plano kaj grandiĝis la gvida plano kaj merkata reguligo; rilate al la distribuo de profitoj inter la ŝtato kaj entreprenoj oni efektivigis en la entreprenoj la duapaŝan anstataŭigon de profito-liverado per impostado; rilate al vigligo de la entreprenoj oni pliiĝis la aŭtonomecon de entreprenoj en produktado kaj administrado kaj provis la sistemojn de fabrik-estra respondeco kaj ekonomia respondeco; rilate al la materiala administrado reduktiĝis la specoj de materialoj liverataj de la ŝtato; kaj rilate al la administra sistemo de la fundamenta konstruado kaj konstrua industrio oni anstataŭigis mon-asignon per kredito kaj praktikis monopolan investon kaj laŭkontraktan proponon.

La reformoj forte kaj rapide ŝanĝis la fizionomion de la ĉina industrio kaj puŝis ĉi tiun en ĝian plej prosperan periodon.

14 000 AVANGARDAJ TEKNIKOJ IMPORTITAJ EN ĈINION

En la sesa jarkvino (1981—1985) Ĉinio importis el aliaj landoj ĉ. 14 000 avangardajn teknikojn, kies plejparto estis uzata por reformi mez- kaj malgrandajn entreprenojn. Nemalmultaj el ili estis aplikataj en la jaro, tuj kiam oni faris importon.

La teknikoj donis bonan profiton, gajnis kaj ŝparis por la ŝtato fremdajn valutojn, rapidigis la re-

noviĝon de produktaĵoj, plenigis mankojn de Ĉinio en rilataj flankoj kaj akcelis la disvolviĝon de novaj materialoj, asimiladon de novaj teknikoj por la nacia bezono kaj produktadon de kompletoj da ekipaĵoj. Tio havigis al entreprenoj talentulojn, teknikojn, instalaĵojn kaj sperton en administrado kaj rapidigis la teknikan reformon kaj reordigon de entreprenoj.

ĈINIO HAVAS 2.39 MILIONOJN DA SCIENCISTINOJ KAJ TEKNIKISTINOJ

Nun Ĉinio havas 2.39 milionojn da sciencistinoj kaj teknikistinoj, kiuj konsistigas trionon de la sciencistoj kaj teknikistoj de Ĉinio. Inter ili estas 570 000 industriaj teknikistinoj, 60 000 agrikulturaj teknikistinoj, 90 000 scienc-esploristinoj kaj 1.24 milionoj da kuraĉistinoj. Rapide kreskis la proporcio de la superaj inĝenierinoj kaj agronominoj, esploristinoj kaj subesploristinoj, ĉef- kaj vicĉefkuracistinoj, profesorinoj kaj vicprofesorinoj.

LA MONUMENTO DE ĈINAJ JUNPIONIROJ STARIGITA EN ANTARKTO

La 20-an de januaro en la ĉina stacio "Granda Muro" en Antarkto okazis solena inaŭguro de la Monumento de Ĉinaj Junpioniroj. Ĉ. kvindek reprezentantoj de diverslandaj antarktaj observostacioj sur la insulo Georgo partoprenis en la inaŭguro por esprimi sian varman gratulon, malgraŭ frosta vento.

Nome de la 170 milionoj da ĉinaj geknaboj, du ĉinaj junpioniroj malkovris la vualon de la monumento. Sur la terglobforma monumento zigzagas la Granda Muro, simbolo de la ĉina nacio. Ĉe la Granda Muro estas stelo kaj torĉo, simbolantaj la organizon de la ĉinaj junpioniroj, kaj sur la muro estas pando kaj pingveno, esprimantaj la volon de la ĉinaj junpioniroj iri al Antarkto, kiam ili

plenkreskiĝos, kaj belan deziron de la homaro pace ekspluati Antarkton. Sur la kupra ŝildo skribiĝas "Monumento de Ĉinaj Junpioniroj".

ĈINAJ ORNAMAJ FLOROJ KAJ ARBEDOJ EN LA INTERNACIA MERKATO

De la lastaj jaroj en Ĉinio vikle disvolviĝas kulturado de floroj kaj arbedoj, nova afero entreprenata de pli kaj pli da kamparanoj por reguligi la internan strukturon de agrikulturo kaj riĉigi ilin.

Laŭ statistiko, en la pasinta jaro la areo por kulturaj ornamaj floroj kaj arbedoj en la ĉina kamparo superis 13 000 hektarojn, kun produktovaloro de pli ol 600 milionoj da jŭanoj (ĉ. 3.2 jŭanoj egalas al unu usona dolaro). Tiaj floroj kaj arbedoj estas vendataj kaj en diversaj urboj de Ĉinio kaj en la internacia merkato.

KRISTALA GERMANIATA BISMUTO DE ĈINIO, LA PLEJ ELSTARA EN LA MONDO

En la internacia konkuro la kristala germaniata bismuto produktita de Ĉinio superis tiujn de Usono, Francio, Nederlando kaj Japanio. La internaciaj sciencistaj rondoj unuanime opinias, ke ĝi


La Monumento de Ĉinaj Junpioniroj en Antarkto



okupas la unuan lokon en la mondo.

La germaniata bismuto estas nova brilanta kristalo uzata por mezuri altenergiajn partiklojn kaj radiojn. En la 80-aj jaroj multaj teknologie avangardaj landoj komencis esplori germaniatan bismuton, kaj Ĉinio la unua sukcese faris ĝin. La kristala germaniata bismuto de Ĉinio havas la plej altan apartigan povon, plej malaltan lum-reduktan kvanton kaj plej grandan simetriecon. Kaj krome, ĝia produktokosto estas malalta, ĝia produktometodo facile lernebla kaj ĝia pogranda produktado ebla.

La avangarde ekipita regadejo de la energia centro de la Baŭŝan-a Stala Kompanio



NOVA ERCO DJAŬJUDAŬ MALKOVITA DE ĈINIO

Sciencistoj de la Oceanologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj malkovris novan kristalan ercon Djaŭjudaŭ en la maro sude de Djaŭjudaŭ-insulo de Taj'ŭan-provinco, Ĉinio. Antaŭ nelonge rilata internacia organizo konfirmis, ke la erco Djaŭjudaŭ estas unu el la novaj ercoj malkovritaj en la naturo en 1985.

NOVAJ PROPONOJ POR MALHELPI FUMADON

En Ĉinio fumas ĉ. 70% de la plenkreskaj viroj. La proporcio de la fumantoj super la aĝo de 15 jaroj en la kamparo estas pli alta ol tiu en la urbo. Tion anoncis la Tutlanda Grupo por Enketo pri Fumado organizita de la Centra Komisiono de Patriota Porhigiena Kampanjo kaj Sanprotekta Ministerio de Ĉinio.

La grupo proponis malhelpi fumadon ĉefe en la lokoj kun multaj fumantoj kaj deadmoni precipe knabojn kaj junulojn de fumado kaj alvokis, ke la kuracistoj kaj instruistoj abstinu la unuaj, ĉar pli ol 50% de ili estas fumantoj. Ĝi proponis ankaŭ instali vagonojn kaj kajutojn por nefumantoj, malpermesi al la lernantoj fumi kaj difini tagon en jaro, en kiu oni ne fumu.

LA BIERO DE ĈINGDAŬ — LA ĈAMPIONO DE BIERO

En la bier-juĝa kunveno okazinta en Vaŝingtono la biero produktita de Ĉingdaŭ, Ĉinio, denove gajnis la ĉampionecon.

En 1981, la redakcio de la influa usona prikonsumaja gazeto "Vaŝingtonanoj" okazigis en Vaŝingtono kunvenon por juĝi bierojn importitajn el diversaj landoj. La biero de Ĉingdaŭ superis la famajn bierspecojn de FR Germanio kaj Nederlando kaj gajnis la unuan lokon. Julie de 1985 la redakcio okazigis kunvenon por juĝi aziajn bierojn kaj la biero de Ĉingdaŭ gajnis la ĉampionecon.

LA PLEJ GRANDA ANTIKVA TOMBO KUN LIGNA ĈERKO PRIFOSATA

La plej granda antikva tombo de Ĉinio, kun ligna ĉerko de Ĝing-gong de Ĉin-regno, estas prifosata en Fengŝjang-gubernio, Ŝenŝji-provinco, kie situis la regno.

La tombo de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770 — 476


a.K.) estas 300 metrojn longa kaj 24 metrojn profunda, kun totala areo de 5 334 kvadrataj metroj.

La prifosado komenciĝis en 1978 kaj nun oni fosis jam pli ol 20 metrojn sub la tersurfaco. La ebenaĵo de la ĉerko havas 140 kvadratajn metrojn, kun bone konservitaj platoj plejparte el cipreso. En la okcidenta parto de la tegmento de la ĉerkujo kuŝas 29 lignaj kestoj en tri vicoj, kiujn ĉirkaŭas ostoj de la entombigitaj sklavo. Oni konstatis, ke la tombo estis konstruita en la dua duono de la sesa jarcento a. K. La tombo, simila al tiu de la Unua Imperiestro de Ĉindinastio, estas ĉirkaŭita de la muroj interna kaj ekstera, kun orienta kavo por loki ĉarojn kaj ĉevalojn.

Elfosiĝis multaj steleoj kun surskribo, kiuj havas gravan signifon por esplori la apartenon de la tiutempuloj.

FOTOEKSPozICIO PRI ŜOPENO EN PEKINO

La fotoekspozicio pri la vivo de la granda pola muzikisto Ŝopeno okazis meze de januaro en la In-



Spinaj ekipaĵoj importitaj de la Dua Tekstila Fabriko de Nantong

ternacia Arta Galerio de Pekino. La eksponitaj 40 fotoj konigis lian biografion. Dum la ekspozicio oni aŭdigis liajn muzikpecojn. La ekspozicio estis okazigita laŭ la kultura interkonsento de Ĉinio kaj Pollando. La inaŭguron partoprenis Lju Ĝiŝjan, vicministro de la Kultura Ministerio de Ĉinio, kaj Z. Dembowski, la pola ambasadoro al Ĉinio. Ili tondis rubandon por ĝi.

LA ĈINA VIRINA TEAMO GAJNIS LA MONDAN SUBĈAMPIONECON DE BAZOPILKO

La Ĉina Virina Bazopilka Teamo, kiu unuafoje partoprenis en mondkonkurso, gajnis la subĉampionecon en la Sesa Monda Virina Bazopilka Ĉampionecon Konkurso, kiu okazis en Aŭklando en januaro. La usona teamo gajnis la ĉampionecon, la nov-zelanda kaj kanada teamoj la trian kaj kvaran lokojn respektive.

ĈINAJ NAĜISTOJ, GAJNINTOJ DE KVAR ORAJ MEDALOJ DE FRANCA INTERNACIA KONKURSO

De la 16-a ĝis la 19-a de januaro okazis en Strasburgo la Or-pokala Naĝa kaj Plonĝa Turniro por 1986. En la konkurso de 18 sportbran-

ĉoj la ĉinaj naĝistinoj Li Ĝinlan kaj Jan Ming gajnis la ĉampionecon respektive de 100-metra papili-naĝo kaj 1000-metra rapid-naĝo kaj la ĉinaj naĝistoj Ĝeng Ĝjan kaj Ĝin Fu la ĉampionecon respektive de 100-metra papili-naĝo kaj 100-metra brusto-naĝo. Ankaŭ sovetiaj sportistoj gajnis kvar orajn medalojn. La bulgaraj kaj francaj sportistoj gajnis po du orajn medalojn. Kaj sportistoj el DDR, FR Germanio, Italio, Belgio, Svedio kaj Nederlando po unu oran medalon.

DEK PLEJ BONAJ SPORTISTOJ DE ĈINIO

En januaro finiĝis la elektado de dek plej bonaj sportistoj de Ĉinio por 1985 okazigita de 20 ĵurnalmaj organizoj de Pekino. La dek plej bonaj sportistoj estas Lang Ping (flugpilkistino), Nje Ŭejping (vejĉiisto), Han Ĝjan (volanisto), Tong Fej (gimnasto), Jan Hong (marŝistino), Caŭ Janhŭa (tablotenisistino), Jang Ŝjilan (flugpilkistino), Li Ning (gimnasto), Ĝjang Ĝjaljang (tablotenisisto) kaj Li Lingŭej (volanistino).

Ĉinaj bazopilkinistinoj en konkurso



PROSPERAS LA TIBETA MERKATO

de ŜJU PENG

Turistoj venintaj al Lhasa interesiĝas pri vizito de la fama Baĝjaŭ-strato, kiu havas la plej longan historion en la urbo. Ĝi estas fama ne nur pro tio, ke ĝi havas pure tibetan stilon kaj ĉirkaŭas Daĝaŭ-templon, sed ankaŭ pro la tieaj vendotabloj kun multspecaj varoj lokitaj surstrate. En la urbo staras pli ol 860 standoj, kie vendiĝas tapiŝoj, mebloj, oraĵoj, arĝentaĵoj, monujoj, drogherboj, poŝtkartoj ktp.

En Lhasa troviĝas ankoraŭ aliaj viglaj bazaroj. Sur la stratoj Ĝinĝu kaj Jutŭo staras ĉefe ŝtataj kaj kolektivaj vendejoj. En la merkato Ĉongsajkang troviĝas 600 kolektivaj kaj privataj butikoj kaj vendotabloj. En la bazaro oriente de Potala-palaco metiĝas ĉ. 20 standoj, kaj en la nordantaŭurba bazaro 160 vendobudoj kaj vendotabloj. . . Tie oni vendas diversajn varojn. Klientoj torentas tien de mateno ĝis vespero.

En la tibeta historio komerco neniam tiel viglis kiel hodiaŭ.

Antaŭ la paca liberigo en 1951, sub la feŭda servuta sistemo komerco en Tibeto estis subevoluinta. Kvankam tiam en Tibeto estis pli ol 2 000 migraj komercistoj, firmoj kaj etkomercistoj, tamen merkatoj koncentriĝis nur en kelkaj urboj kaj urbejoj kaj preskaŭ ne estis komercejo en vastaj agrokulturaj, paŝtaj kaj malproksimaj regionoj.

Inter la 2 000 komercistoj la plejparto venis el Hindio kaj Nepalo. Tiam pro tre malfacila trafiko oni transportis ĉefe per ĉevaloj en Tibeton grenon, teon, brunan sukeron, ŝtofon, ĉiutagajn bezonaĵojn kaj elportis el Tibeto drogon, ŝaflanon kaj aliajn. Ili negocis ĉefe varon kontraŭ varo. La kamparanoj kaj paŝtistoj interŝanĝis grenon kontraŭ salo kaj ĉevalon kontraŭ teo ĉefe en foiro, kiu okazis unufoje ĉiujare. Tiam la jara totala komerca kvanto de la tuta Tibeto egalas nur al pli ol 11 milionoj da ĵuanoj.

Post la liberigo Tibeto tuj starigis siajn ŝtatajn komercajn administraciojn, kiuj fariĝis ĉefa parto de la tieaj komercaj entreprenoj. En la fino de 1954 la trafiko multe faciliĝis, post kiam la Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo kaj Siĉŭan-Tibeta Ŝoseo estis transdonitaj al uzado. Varoj el aliaj provincoj de la lando senĉese transportiĝis en Tibeton. Iuj ĉiutagaj bezonaĵoj, kiaj teo kaj tabako de Junnan, blanka sukero, metalaĵoj, feraĵoj, almanĝaĵoj de la landinterno, kiuj antaŭe devis esti transportitaj en Tibeton tra alia lando, nun transportiĝas rekte en Tibeton per tiuj du ŝoseoj. Specialaj produktaĵoj de Tibeto kaj varoj importitaj de najbaraj landoj transportiĝas landinternan ankaŭ per ili. Ĝis septembro, 1955 la varoj produktitaj de Ĉinio regis la tibetan merkaton,

sole la ĉinaj varoj vendataj en la privataj komercejoj jam superis 60% de la totala vendovaloro. Dank' al la ŝosea transportado rapide disvolviĝis la tiea komerco. Laŭ statistiko, antaŭ la demokratia reformo en 1959 la jara komerca kvanto de aĉeto kaj vendo, importo kaj eksporto jam superis 87 milionojn da ĵuanoj, 7.9-oble de tiu en la antaŭvespero de la liberigo.

Post la demokratia reformo la ŝtata merkato en Tibeto rapide disvolviĝis. En 1965 jam funkciis 193 ŝtataj komercejoj en la aŭtonoma regiono, ĉiuj gubernioj havis sian komercan kompanion. Samtempe kun tio, kamparanoj kaj paŝtistoj funkciigis provizan kaj disvendan kooperativon kaj konsuman kooperativon por disvolvi varproduktadon kaj organizi aĉeton kaj vendon de varoj. En 1965 Tibeto jam havis 683 distriktajn kaj subdistriktajn kooperativojn, konsumajn kooperativojn kaj aĉet-disvendajn agentejojn, kio estis tre oportuna por la popolamasoj en iliaj produktado kaj ĉiutaga vivo. En tiu jaro la totala komerca kvanto de aĉeto kaj vendo, importo kaj eksporto jam atingis 231.56 milionojn da ĵuanoj, 21-oble de tiu en la antaŭvespero de la liberigo.

La "kultura revolucio" komencita en 1966 multe malbone influis la disvolvon de la tibeta

komerco. Privataj entreprenoj estis nuligitaj, ĉiuj kolektivaj provizaj kaj disvendaj kooperativoj estis administrataj laŭ la ŝtata modelo, la cirkulaj kanaloj de varoj estis monotonaj, la administrado ne vigliĝis, varspecoj rimarkinde malmultiĝis kaj la merkata provizado estis streĉa, kio malfaciligis al la popolamasoj la produktadon kaj ĉiutagan vivon.

De 1980, laŭ la instrukcio de la ĉina registaro en Tibeto oni praktikis novan ekonomian politikon, ke oni ne faru al tibetanoj rekvizion kaj aĉeton. Dank' al tio, la tibeta ekonomio rapide disvolviĝis kaj la popola vivo pliboniĝis. En la lastaj jaroj la tibetaj komercaj fakoj trovis pli da fontoj de industriaj produktaĵoj, precipe tiujn de naciaj ko-

mercaĵoj, malfermis merkaton, restarigis foiron, kuraĝigis okazigi la ekspoziciojn kaj foirojn, plimultigis komercajn punktojn kaj aktive disvolvis kolektivajn kaj privatajn komercejojn, kio prosperigis la tibetan komercon.

Nun formiĝis en Tibeto la komerca sistemo kun individua kaj kolektiva komercado kiel la ĉefa parto, kaj samtempe funkcias pluraj kanaloj kaj administraj manieroj. Laŭ statistiko de komercaj departementoj, ĝis la fino de 1984 Tibeto havis sume 16 000 komercajn punktojn. 16-oble de tiu en 1965. Inter ili estis 13 000 individua komercaj familioj, 2 700 kolektivaj komercaj punktoj kaj 392 ŝtataj komercaj punktoj. Po mil homoj en la tuta aŭtonoma regiono posedis 8 komercajn punktojn.

Samtempe, ankaŭ foiroj urbaj, vilaĝaj kaj landlimaj pli malpli kreskis. Krome, ankaŭ la tradicia interŝanĝo ĉefe de greno kontraŭ salo, neregulaj varekspozicioj, foiroj k. a. servas kiel akcesoraj kanaloj por cirkuligi tibetajn varojn.

Ĉamdo, la centra urbo de la orienta Tibeto, havas 728 familiojn, 366 el kiuj okupiĝas pri individua komerco. Tie servas manĝejoj, drinkejoj, butikoj kaj alispecaj komercejoj, en kiuj laboras pli ol 550 homoj. Kaj estis vendataj miloj da specoj de varoj. Foiro por vestoj kun areo de pli ol 500 kvadrataj metroj finkonstruiĝis antaŭ nelonge. La malnova foiro estas rekonstruita kaj pligrandigita, kun pavimitaj vojoj, kie oni starigis vicojn da vendobudoj el ŝtalaj framoj kaj

Stando de lanteksaĵoj sur Baĝiaŭ-strato





betonaj vendotabloj, kiuj tamen ne povas kontentigi la bezonon de komercistoj plimultiĝantaj tagon post tago. Nun la vendotabloj de felo, fruktoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj etendiĝas laŭ la ŝoseo.

Ke rapide multiĝas individuaj komercistoj kaj kolektivaj komercejoj, tio formis rimarkindan trajton de la prospera tibeta merkato. Ili vigle komercas por la merkata bezono, kio estas tre oportuna al la popola vivo, kaj ankaŭ ili mem riĉiĝis. Inter la individuaj vendistoj en Lhasa estas lerta komercistino Cangmula. En 1980 ŝi okupiĝis pri komerco. Komence ŝi vendis varojn por la ŝtataj komercejoj kaj ricevis malmultan profiton. Poste ŝi ŝanĝis sian komercan manieron kaj mem veturis al grandaj urboj en la landinterno, kiaj Ĉengdu, Ĉongĉing, Ŝanhajo kaj Kantono, por aĉeti varojn kaj transporti aviadile debitha-

vajn varojn al Tibeto. Ŝi ne nur mem aĉetis varojn, sed ankaŭ fondis vastajn informajn kaj provizajn retojn en multaj urboj. Ĉar ŝiaj varoj estas bonvenaj kaj debithavaj, ŝia komerco pli kaj pli prosperiĝas. Nun ŝia kapitalo jam kreskis de 3 000 ĝis 30 000 jŭanoj. En Lhasa, Ŝigaze, Ĉamdo kaj aliaj lokoj estas multaj tiaj komercistoj.

La prospero de la tibeta komerco montriĝas ne nur en la urbo, sed ankaŭ en la agrokulturaj kaj paŝtaj regionoj, kie nun fundamente solviĝis la problemo de malfacila aĉetado kaj vendado por la paŝtistoj. Antaŭe la tibetanoj, loĝantaj en Lakangsubdistrikto, Lhoĝag-gubernio ĉe la limo la Bhutano, por aĉeti objektojn devis transpasi monton altan pli ol 4 000 metrojn super la marnivelo por du tagoj. En 1983 fondiĝis butikoj. Komi-

zoj ofte portas varojn al vilaĝoj aŭ rekte al hejmoj de klientoj, tial ili povas aĉeti ĉiutagajn varojn kaj malgrandajn agrikulturilojn sen eliri el siaj vilaĝoj aŭ hejmoj. Nun la paŝtistoj de la tuta regiono povas aĉeti bezonatajn varojn, ne elirinte el sia loĝloko.

La merkata malfermiĝo de Tibeto altiras individuajn komercistojn kaj metiistojn el dekkelkaj provincoj kaj urboj, kiaj Ĝeĝjang, Siĉŭan, Ĉinghaj, Pekino k. a., al Tibeto por fari negocon, riparon kaj aliajn servajn laborojn. Laŭ statistiko, je la fino de 1984 la nombro de la familioj, kiuj venis el diversaj provincoj kaj urboj de la landinterno kaj okupiĝis pri individua, kolektiva komerco aŭ serva aktivado, superis 5 000. Komercaj entreprenantoj venintaj el Nepalo por fari negocon en Tibeto pli



Nepala komercistino (maldekstre) en sia butiko de kapornamaĵoj en Lhasa

kaj pli multiĝis kaj nur en Lhasa estis 97 tiaj familioj en la mezo de majo, 1985.

Komercistoj el la landinterno akurate transportis aviadile kaj aŭte en Tibeton elektrajn aparatojn, vestojn, manĝaĵojn, ludilojn, ovojn, akvomelonojn, vinberojn kaj aliajn, kio estas bona veno al la tibeta popolo. Sur stratoj de Lhasa pli ol 300 landinternaj metiistoj riparas elektrajn aparatojn kaj horloĝojn, tajloras vestojn, flikas ŝuojn kaj faras meblojn. Kaj tiel solviĝis la malfacilo en vestofarado kaj riparado. Pli ol 1 000 individuaj komercistoj el la landinterno transportas varojn laŭ la Ĉinghaj-tibeta Ŝoseo en la Nord-tibetan Stepon 4 500 metrojn super la marnivelo. Manĝaĵoj kun la Siĉŭan-a gusto, legomoj de Ĉinghaj, ĉiutagaj bezonaĵoj de Gansu, ŝtofo kaj laŭmodaj vestoj de Kantono, malgrandaj radiorice-

viloj de Ŝanhajo k. a. videblas en tibetanaĵoj. Kvankam en la pasinteco la ŝtataj komercaj fakoj de la norda Tibeto organizis servajn grupojn por porti varojn al malproksimaj paŝtejoj, tamen estis ankoraŭ malfacile por paŝtistoj aĉeti varojn pro disa loĝado. Nun granda nombro da landinternaj komercistoj vendas inter paŝtistoj plumvestojn kaj vojaĝajn ŝuojn, kiuj estas laŭmodaj en la landinterno. Influate de la landinternaj komercistoj, nemalmultaj paŝtistoj de la norda Tibeto entreprenas komercadon. En 1984, en Hagĉju aperis 900 paŝtistaj familioj okupiĝantaj pri komerco. Pli ol 200 el ili aĉetis aŭtojn por komerca transportado. En Jongba-subdistrikto, Sogŝjan-gubernio, antaŭe la jara pokapa enspezo estis ĉ. 100 jŭanoj. Lastjare la pokapa enspezo duobliĝis, dank' al la plenenergia disvolviĝo de pri-

laborado, transportado kaj komercado.


En la lastaj jaroj, dank' al la disvolviĝo de varproduktado kaj sufiĉa provizo de varoj en la agrokulturaj kaj paŝtaj regionoj, la tibeta merkato ŝanĝiĝis de vendista merkato en la aĉetanta. Antaŭe oni devis longe viciatendi por aĉeti malfacile aĉeteblajn krudan lanteksaĵon, drapojn, vestojn, feltajn kusenojn, brakhorloĝojn, diktafonojn kaj aliajn nacistilajn produktaĵojn kaj ĉiutagajn bezonaĵojn. Nun ili povas aĉeti varojn laŭ sia elekto. Prezoj de industriaj produktaĵoj estas stabilaj, tiuj de nacistilaj varoj ĝenerale malaltiĝis, la vara abundeco en la merkato estas senprecedenca. En 1984 la totala podetala kvanto de varoj atingis 1 057 580 000 jŭanojn, 96-oble de la totala komerca kvanto antaŭ la liberigo de Tibeto.



En aĉetejo de brutproduktaĵoj

Foto de JUAN KEĜONG

Tibeta maljunulo vendanta preparilojn de buter-teo






Foiro sur stepo



Elekto de ŝtofoj



Komerca strato en Lhasa



La placo en festo

EL REALA VIVO DE ĈINIO

Sur Tjan'anmen-placo

Fotoj de ŬANG KUNĜONG

Tjan'anmen-placo fotita per larĝangula lenso



Tjan'anmen-placo en la centro de Pekino interligiĝas oriente kaj okcidente kun la 5-kilometra Ĉang'an-strato. En la suda parto de la placo staras la Monumento de Popolaj Herooj, norde de la placo imponas Tjan'anmen-pordego, oriente sidas la Muzeo de la Ĉina Historio kaj okcidente la Popola Halo. La placo aspektas vasta kaj majesta, antikva kaj juna.

Matene, kiam la suno leviĝas, komenciĝas nova tago de la placo. Kolektiĝas ĉiutage sur ĝi turistoj el diversaj partoj de la lando kaj de la mondo, kaj inter ili, kompreneble, ne mankas maljunaj pekinanoj. La placo abundas je homoj kaj preter ĝi navetas veturiloj. Oni promenas, ludas kaj babilas sur ĝi. Iuj

rigardas reliefojn en la malsupra parto de la monumento kaj aliaj meditas antaŭ Tjan'anmen-pordego. Blankharaj avoj ludas kun siaj nepoj kaj junaj patrinoj instruas al sia infano iri. Granda parto de la turistoj estas gejunuloj. Iuj el ili diskutas pri la homa vivo kaj la estonteco kaj aliaj dancas kun ĝojo. Nemalmultaj fotas sin antaŭ la Popola Halo, Tjan'anmen-pordego kaj ŝtonaj leonoj ĉe la pontetoj super la rivereto Ĝinŝuj.

Kiel fotisto mi ŝatas la lokon plenan de viveco kaj sunlumo. Mi ofte fotas sur la placo, iafoje ĉe sunleviĝo, iafoje en vespero, iafoje en nokto. Kaj ĉiufoje min allogas senombraj spektakloj plenaj de vivetoso, kaj mi kaptas ĉiun belan momenton.

Post neĝado






Dancado

Antaũ fotado




Gojo en ludo





Korpa ekzercado sur la placo ĉe la sunleviĝo

"Tru ankoraŭ kelkajn paŝojn!"



Iu kamparano en Henan-provinco bredas flavan bovon kun dek kornoj. Krom la du kornoj sur la kapo, ĝi havas ankaŭ po tri kornojn ambaŭflanke sur sia dorso kaj po unu kornon ambaŭflanke de sia postaĵo. La bovo sentas doloron, kiam la kornoj estas skuitaj.

La mastro de bovo diris: "La dekkorna bovo manĝas duoble pli ol la ordinara bovo. Ĝi ne ŝparas sian forton dum plugado." Li iam forsegis ĝiajn superfluajn kornojn, sed post kelka tempo la kornoj sur la dorso denove kreskis je 18 centimetroj kaj tiuj sur la postaĵo je 3 centimetroj.

PLENIGU LA BLANKOJN

Ĉiu grupo de desegnaĵoj havas sian leĝon. Trovu ĝin kaj plenigu la blankojn per ciferoj.

(Solvo trovebla en ĉi tiu numero)

HUMURAJOJ

1. Sencerbulo

Vartistino de infanĝardeno: Infanoj, post momento onklino de la kontraŭepidemia stacio venos fari al vi preventan injekton. Bone sidigu vi ĉiuj!

Ŝjaŭĉjang: Por kio utilas la preventa injekto, instruistino?

Vartistino: Por preventi encefaliton.

Ŝjaŭĉjang: Do ne faru tion al mi.

Vartistino: Kial?

Ŝjaŭĉjang: Mi ne povas suferi encefaliton, ĉar mi ne havas cerbon.



Vartistino: Kiu diris al vi?

Ŝjaŭĉjang: Mia panjo. Ankaŭ ŝi estas kuracistino. Ĉiufoje, kiam mi misfaris ion, ŝi diris, ke mi estas sencerbulo.

2. Nova Aritmetika Instruistino

— Kio estas la plej elstara trajto de via nova aritmetika instruistino?

— Ŝiaj vortoj ne estas fidindaj kaj ĉiam ŝanĝiĝas. Ŝi ĵus diris al ni, ke tri plus tri estas ses, sed tuj poste ŝi diris, ke du plus kvar estas ses, kaj post momento ŝi diris, ke kvin plus unu estas ses. Vidu, ĉu ŝiaj vortoj estas fidindaj?



Dekkorna bovo


Nacimalplimultaj kantistoj

Fotoj de LI ĈUNGENG

Antaŭ nelonge okazis en Pekino la Unua Voĉmuzika Konkurso de Nacimalplimultaj Junuloj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. 25 junaj nacimalplimultaj kantistoj el 18 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj 7

nacimalplimultaj institutoj prezentis kantojn en forta nacia stilo kaj densa loka gusto, plene montrante la tradician kulturon de la ĉinaj naciecoj kaj ĝian novan disvolviĝon. Ĉi tie estas fotoj de kelkaj premiitaj kantistoj:

Kantistino Zongjong Ĝŭoma el la tibeta nacieco



Ĝŭang-a kantistino Tang Pejĝu





Tuġja-a kantistino Jang Sugūang

Dung-a kantistino Šjaū Mej



Kazaĥa kantisto Nazar



第二十三课 Dudektria Leciono

乘出租汽车 *Veturi per Taksio*

Ofte uzataj vortoj

是出租汽车站吗

我要一辆汽车

去哪儿

到哪儿等您

您叫什么名字

请快点儿

shì chūzū qìchēzhàn ma

wǒ yào yīliàng qìchē

qù nǎr

dào nǎr děng nín

nín jiào shénme míngzi

qǐng kuàidiǎnr

ĉu estas taksistacio

mi volas taksion

kien iri

kie vin atendi

kiel vi nomiĝas

bonvolu rapidi

Dialogo

A: 喂，是出租汽车站吗？

A: **Wèi, shì chūzū qìchēzhàn ma?**

ha lo, est- taksi- staci- ĉu

A: Ha lo, ĉu estas taksistacio?

B: 是。

B: **Shì.**

jes

B: Jes.

A: 我想要一辆出租汽车。

A: **Wǒ xiǎng yào yīliàng chūzū qìchē.**

mi vol- unu taksi-

A: Mi volas taksion.

B: 去哪儿？

B: **Qù nǎr?**

ir- kie

B: Kien vi veturos?

A: 北京饭店。

A: **Běijīng Fàndiàn.**

pekin- hotel-

A: Al la Pekina Hotelo.

B: 什么时候用车？

B: **Shénme shíhou yòng chē?**

kiam uz- taksi-

B: Kiam vi bezonos taksion?

A: 六点一刻。

A: **Liùdiǎn yīkè.**

ses hor- dek kvin minut-

A: Je la sesa kaj dek kvin minutoj.

B: 车开到哪儿等您？

B: **Chē kāi dào nǎr děng nín?**

taksi- vetur- kie atend- vi

B: Kie la taksio vin atendos?

A: 友谊宾馆门口。

A: **Yǒuyì Bīnguǎn ménkǒu.**

amikec- hotel- enirej-

A: Ĉe la pordo de la hotelo Amikeco.

B: 您叫什么名字？

B: **Nín jiào shénme míngzi?**

vi nomiĝ- kia nom-

B: Kiel vi nomiĝas?

A: 我叫鲍尔，英国人。

A: **Wǒ jiào Bào' ěr, yīngguó rén.**

mi nomiĝ- Paŭlo, brit-

A: Mi nomiĝas Paŭlo, el Britio.

B: 车子十分钟后就到。

B: **Chēzi shífēnzhōng hòu jiù dào.**

taksi- dek minut- post tuj ating-

B: La taksio atingos tuj post dek minutoj.

A: 我有急事, 请快点儿。

B: 我们尽量赶吧。

A: Wǒ yǒu jíshì, qǐng kuàidiǎnr.

B: Wǒmen jìnlìàng gǎn ba.

mi hav- urĝ- afer-, bonvol- rapid-

ni laŭeble rapid-

A: Mi havas urĝan aferon, bonvolu rapidi.

B: Ni rapidos laŭeble.

Klarigoj:

1. 喂 estas uzata ofte por voki iun aŭ veki ies atenton.

2. 十分钟后就到: Ĉi tie 就 kun la senc'o "tuj" esprimas agon okazontan senprokraste post iu tempo.

(Daŭrigo de p. 23)

* Geknaboj (ekde 8-20j) membroj de Junulara Esperanto-Klubo volas korespondi tutmonde. Respondo garantiata. Adreso: Junulara Esperanto-Klubo, ZDK Huty Batory, ul. St. Batorego 6, 41-506 Chorzow, Pollando.

* 22-j. studentino de kemio, volas korespondi tutmonde kun kemiaj gestudentoj kaj kemie-muloj. F-ino Dorre Darakšan, 51 Keyhan (shargi), Sohrevardi (jonubi), Tehran 15696, Irano.

* Suna-mara Internacia Ferio-semajno (6-13-7-86 kaj 21-28-9-86) en Reggio Calabria, urbo situanta ĉe la suda pinto de Kontinento Italio, antaŭ la insulo Sicilia. Informoj ĉe: s-ro Fiume Domenico, tel. 0965-43065, via Nazionale N. 80 Archi, I-89051 Reggio Calabria, Italio.

* 30-jara sveda f-ino deziras korespondi tutmonde pri muziko, literaturo, vojaĝo kaj besto. Karin Hedman, Majrovagen 14, S-12245 Enskede, Svedio.

* Korespondkontaktojn en la tuta mondo serĉas 14-35 jaraj gekursanoj kun interesoj: ĝeneralaj temoj, vivo de junularo, naturo, turismo, sporto, bildkartoj ktp. Skribu al sekr. s-ro Stanislav Kareš, Tylova 1262, 508 01 Horice, Ĉeĥoslovakio.

* Minista Esperanta Klubo serĉas kontaktojn kun samfakaj kluboj kaj samfakuloj en Ĉinio. Gorniczny Klubo Esperantystow, K.W.K. "Knurów", ul. Dworcowa 1, PL-44-220, Knurów, Pollando.

* La testamento de Ludwig van Beethoven (Heiligenstadt, 1802), en esperanta traduko, estas havebla kontraŭ 2 irk. aŭ 20 nedifektitaj uzitaj poŝtmarkoj de via lando ĉe: Esperanto-Info,

Rudolfnergasse 8/11, A-1190 Wien (aerpoŝto!).

* Societo por Japana-Ĉina Amikeco per Korespondado, civitana organizo neregistara fondita en 1979, peras por ĉinoj korespondadon kun japanoj en Esperanto. Ĝi povas peri korespondadon ankaŭ en lingvoj japana kaj angla, sed ne en ĉinlingvo, ĉar bedaŭrinde ankoraŭ nur malmultaj el ĝiaj anoj scipovas ĉinlingve. Skribu kun indiko de aĝo, sekso, profesio, preferoj ktp. al la respondeculo de ĝia esperanto-sekcio: S-ro Tukui Hideki, Minami-suna 2-3-8-1403, kôto-ku, Tokio, 136 Japanio.

* Internacia Esperantista Heksa Ŝaka Klubo (IEHŠK) propagandas tutmonde E-ludon — ŝako sesangula. Kontraŭ 3 irk. vi ricevos tabulon, regulojn kaj kondiĉojn de aliĝo. Skribu al: IEHŠK, Box 27, Postamt, Minsk, SU-220050, USSR.

Ĉerko el oro kaj arĝento

(Artaĵo)

Foto de GŬO JOŬMIN

La ĉerko estis elegante farita el oro kaj arĝento en la jaro 741 p. K. Ĝia arĝenta ekstera parto longas 21 centimetrojn, kun versimilaj oraj homfiguroj en la ĉirkaŭaĵo kaj kun la kovrilo inkrustita per multekostaj ŝtonoj kaj garnita per perlaĵ franĝoj. Ĝia ora interna parto longas 14 centimetrojn, kun du verdaj vazoj, kiu entenas kristalajn relikvojn. La artaĵo estis elterigita en 1985 ĉe la ruino de la templo Cingšan en Lintong-gubernio, Senŝji-provinco.





Čerko el oro kaj arĝento (Artajo)

古寺深山藏 癸亥年冬月 銘明 畫

